




VIVFACETOJ DE TIBETO HODIAŬA

1. La tibetanoj, same kiel la aliaj nacioj en nova Ĉinio, ĝuas plenan liberon en religia kredo. Jen estas solena sutro-prelega kunveno antaŭ Culakang-templo en Lhasa.
2. Pli ol 30,000 Lhasa-anoj kunvenis antaŭ Potala-palaco por celebri la Maj-unuan Feston kaj festi la venkon en ekstermo de la ribeluloj en la suda regiono de Tibeto.
3. Post la liberiĝo de Tibeto, la Centra Popola Registaro konstruis en ĝi pli ol 7,000 kilometrojn da aŭtovojoj, kio multe faciligis la vivon tiean.
4. Nun Lhasa ankaŭ havas sian modernan elek-trejon.
5. Multaj novaj domoj konstruiĝis en Lhasa dank' al la helpo de la Centra Registaro.

(Daŭrigo sur p. 143)



La 44-a Universala Kongreso

BALDAŬ okazos la 44-a Universala Kongreso en Varsovio, ĉefurbo de la lando de D-ro L. L. Zamenhof. Okazos ankaŭ en tiu ĉi jaro la 100-a datreveno de naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto. La koincido estas ne nur duoble ĝojinda afero por la kongresanoj, sed ankaŭ signifoplena evento en la kroniko de Esperanto-movado. Esperantistoj de diversaj partoj de la mondo venos, renkontiĝos, amikiĝos kaj festos en la bela, historia urbo de Pollando, kie la kreinto de la internacia helplingvo vivis, laboris kaj revis pri la paco de homaro.

Jam pli ol sepdek jaroj pasis de post la publikiĝo de Esperanto. Sed la bela revo, je kiu ĉiuj justaj, vivamaj homoj—inter ili esperantistoj—partoprenas, restas ankoraŭ ne plenumita. Certe, multaj sindonemaj, bravaj pioniroesperantistoj laboradis kaj agadis por la disvastigo de Esperanto, dezirante ke per ĝi oni povas interkomunikiĝi kaj sekve forigi la miskomprenon ekzistantan inter la

loĝantaro de la terglobo. Kaj pli multaj fervoraj samideanoj daŭre laboradas kaj agadas por la sama celo, eĉ pli vigle. Tamen intertempe du mondmilitoj okazis, kaŭzante suferon kaj mizeron sen-

ekzemplan en la historio de homaro. Dume eĉ la Universala Kongreso devis ĉesigi sian kunvenon. Sed Esperanto ne pereis. Tio ĉi estas pruvo de la fakto, ke ĉiuj popoloj havas la fortan deziron por paco, interkompreniĝo kaj interamikiĝo. La Universala Kongreso kompreneble estas unu esprimo de tiu deziro. Ĝia daŭra kunvenado post la milito donas al la esperantistoj fortikan konvinkon en la fina venko de tiu deziro.

La nuna kongreso, kiu okazos en Varsovio, havos plian signifon ol nur tradicia agado. Kiel omaĝo al D-ro Zamenhof, ĝi montras, kiel la esperantistaro valorigas la pacaman ideon de la Esperanto-kreinto kaj alte taksas la rolon kiun la internacia helplingvo povas ludi en la interkompreniĝo de popoloj urĝe necesa por la hodiaŭa mondo. Kaj la urbo Varsovio! Ĝi estis preskaŭ tute detruita de faŝistoj. Post la milito restis en ĝi nenio escepte amasojn da ruinoj. Sed ĝi renaskiĝas. Sur la ruinoj nun staras belaj, novaj konstruaĵoj, inter ili la 32-etaĝa Kulturpalaco, en kiu la 44-a Universala Kongreso okazos. La renaskiĝo de Varsovio estas simbolo de homa forto, kiu povas venki ĉion malbonan kaj konstrui novan vivon kaj belan estontecon. La kunvenado de la kongreso en la ĉefurbo de socialista Pollando esprimas la vivforton de Esperanto, la konvinkon pri ĝia fina venko, kaj samtempe atestas kun elokventeco, ke la deziro por interkompreniĝo kaj interamikiĝo povas transpasi limojn de malsamaj ekonomiaj-sociaj kaj politikaj sistemoj.

Per tiu ĉi kongreso oni povas kredi, ke Esperanto marŝas al nova etapo, en kiu la universala deziro por amikiĝo inter homaro donos renoviĝantan vigecon kaj praktikecon de la internacia helplingvo.



44^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
en jubilea Zamenhofa jaro
VARSOVIO 1-8 DE AŬGUSTO 1959

EL POPOLA ĈINIO

Dumonata Kultura Gazeto

Eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Adreso: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio

Enhavo de N-ro 4 (55), 1959

Bildo sur la kovrilo — Lotusfloroj (Pentris Pan Tian-ŝou)

Lumo brilas en Tibeto

Kiu meritas la simpation

Medalo kaj pelto

Aŭto-industrio en Ĉinio

La maljuna ĉeflaboristo

Rakonto pri la eniro en Tibeton de princino Ven-ĉeng

Kampanara milito fine de Kin-dinastio

Esperanto marŝas

Bildo sur la dorsa kovrilo — Sur strato de Lhasa (Lignogravuris Li Huan-min)

Lumo Brilas en Tibeto

La unua paŝo al lumo

EN la pasintaj 8 jaroj post la liberiĝo de Tibeto, prosperiĝis okulfrape ĝiaj konstrua laboro, ekonomio kaj la vivo de la popolo dank' al la fervora helpado de la frataj nacioj de la patrio. Kune kun la Tibeta popolo, trupanoj de la Popola Liberiga Armeo kaj laborantoj de diversaj ŝtataj institucioj elhakis aŭtovojojn sur krutegaj montoj kaj konstruis pontojn trans torentajn riverojn. Sur la dezertejoj de Lhasa kaj Ŝjekaz, la du ĉefaj urboj en Tibeto, aperis novaj pluretaĝaj domoj kaj disaŭdiĝas el ili maŝinbruado. Apud la aŭtovojoj kaj sur la vastaj herbejoj en norda Tibeto elkreskis multaj novaj urbetoj. Krome, la armeanoj kaj civilaj laborantoj enkondukis modernan kulturon kaj medicinlaboron en la Tibetajn urbojn kaj vilaĝojn, kaj sekve malgrandiĝis la mortoprociento, ĉesis la disvastiĝo de variolo kaj aliaj epidemioj ke ne plu minacas bruto-epidemioj diable teruraj. Iliaj laboroj estas varme bonvenigataj de la tibetanoj, kaj pli intimiĝas la rilato inter la Tibeta kaj Han-a nacioj kaj tiu inter la Tibeta kaj la aliaj nacioj de Ĉinio.

Distanco kaj baroj venkitaj

En la longa pasinteco, tre malfacila estis la komunikado inter Tibeto kaj la interna Ĉinio.

Unue drinku pro la signifoplena printempo de 1959 antaŭ ekplugado!

Foto de Ging Gia-dong



Por atingi Lhasa-n vojaĝantoj de interna Ĉinio devis sin doni al la skuado sur la dorso de jakbovo aŭ mulo por 3 monatoj, foje eĉ duonjaro. Nun jam konstruiĝis la Hikang-Tibeta kaj Kinghaj-Tibeta aŭtovojoj, kaj ankaŭ aperis regule cirkulantaj pasaĝeraj aeroplanoj en la t. n. "netraveturebla regiono en la aero". Tiuj ĉi fortikaj komunikaj ligiloj firme kunligas Tibeton kun la internaj regionoj de Ĉinio, kaj la naturaj baroj inter la Han-a kaj Tibeta nacioj estas venkitaj de ilia komuna klopodado.

Krome, multe pli faciliĝis ankaŭ la komunikado inter la urboj de Tibeto: la aŭtovojoj de Lhasa al Ŝjekaz, de Ŝjekaz al Ĝjelci, de Ĝjelci al Jatung konstruiĝis kaj malfermiĝis al trafikado unu post la alia en la jaro 1955. Nun en Tibeto jam troviĝas ĉ. 3,000 kilometroj da aŭtovojo kaj 1,000 kilometroj da ŝoseo trairebla de aŭtoj; oni povas veturi per aŭto de la okcidenta bordo de Ginŝa-rivero en orienta Tibeto ĝis la urbo Kartok en la regiono de Ali en okcidenta Tibeto, kaj de Tanglamontaro en la nordo ĝis la grava urbo Jatung en Himalaja-montaro en suda Tibeto.

Ekbruas maŝinoj kaj brilas elektraj lampoj

Antaŭ la jaro 1951, apenaŭ ekzistis industrio en Tibeto. En Lhasa troviĝis nur malgranda elektrejo kaj monerfabriko malbone ekipitaj. En la jaro 1951, kiam liberiĝis Tibeto, la elektrejo donis jam nenian elektron, kaj ĝi refunkciiĝis nur en 1954 dank' al la riparado de la laborantoj el interna Ĉinio.


En la jaro 1955, la Centra Popola Registaro decidis helpi al Tibeto en konstruado, kaj sekve de tio konstruiĝis, unuj post aliaj, industriaj kaj akvo-konservaj konstruaĵoj. En Lhasa konstruiĝis nova hidroelektrejo, kaj la antaŭa elektrejo estis pligrandigita. La kapacito de tiuj ĉi elektrejoj estas 20-oble pli granda ol tiu de la malnova. Ili ne nur povas provizi elektron por lumigado de la urbo, sed ankaŭ kontentigi la bezonon de elektro en industrio kaj

komunikado. Ankaŭ en Ŝjekaz konstruiĝis termoelektraj. Krome, en Lhasa konstruiĝis malgranda feraj-fabriko, ledpreparejo kaj aŭtoriparejo. Dank' al la ledpreparejo, oni povas prepari ledon tie kie ĝi estas abunde produktata, kaj tiel disvolvi la produktadon de ledajoj; dank' al la ferej-fabriko, oni povas elŝpari grandan kvanton da laborforto en permana forĝado de agrikulturaj instrumentoj. La aŭtoriparejo povas ripari mil aŭtojn en ĉiu jaro, kaj tio multe kontribuas al la disvolvo de la komunikado en Tibeto. Ĉio ĉi tio estas delonge sopirata de la Tibeta popolo.

“La bonfarantoj”

En la pasintaj 8 jaroj, la Centra Popola Registaro faris, laŭ la Kontrakto por Paca Liberiĝo de Tibeto, diversajn laborojn por paŝon post paŝo disvolvi ĝiajn agrikulturon, brutobredadon, industriojn kaj komercon, kaj la kulturon kaj edukadon de la Tibeta nacio. La produktado de Tibeto estas ĉefe agrikultura kaj brutbreda. Sed en la pasinteco, al la Tibetaj terkulturistoj kaj paŝtistoj sub la feŭdisma reĝimo mankis kapitalo kaj tre postigitaj estis iliaj produktaj teknikoj. Ekde la jaro 1951, la ŝtato komencis disdoni seninteresan pruntmonon kaj senpagajn agrikulturilojn en grandaj nombroj al la kamparanoj, por ke ili pligrandigu la areon de kulturata agro kaj ĝin fekundigu per pli multe da sterko. Akirinte la pruntitan monon, Tibetaj terkulturistoj diris kortuŝite, ke, Prezidanto Maŭ estas pli luma ol la suno. Ili nomas la laborantojn zorgantajn pri la monpruntado por agrikulturo “Bonfarantoj.” En la jaro 1954, Lhasa-rivero kaj Njangĉu-rivero inundis multajn vilaĝojn. La Centra Registaro distribuis grenon kaj monon al la plagitaj kamparanoj por helpi al ili venki la malfacilon kaj rekomenci produktadon. Multaj kamparanoj eklarmis de emociiĝo ricevante donacitan grenon. Sur la herbejoj de Tibeto paŝtiĝas ŝafaroj kaj bovaro, de kiuj vivdependas la paŝtistoj. En la pasinteco, la brutoj estis ofte falĉitaj de epidemioj. Tio estis granda minaco al la paŝtistoj. Ekde la jaro 1951, la ŝtato fondis multajn veterinarajn hospitalojn kaj kuracejojn, kiuj imunigis grandan nombron da brutoj per injekcio kaj kuracis multajn malsanajn brutojn, kaj ĉesigis plurfoje epidemiojn inter la brutoj.

Longan historion havas la ekonomia interrilato inter Tibeto kaj la internaj regionoj de Ĉinio, de kie alliveriĝas por la tibetanoj vivbezonoj kiaj teo, porcelanaĵoj k. a., kaj la produktaĵoj de Tibeto estas portataj en tiujn regionojn por disvendado. Sed pro la malhelpoj de imperiistoj kaj enlandaj reakciaj regantoj kaj la malfacilo en komunikado, tre limigitaj estis la komerco inter tiuj regionoj. Por




Tibetanoj vivantaj kaj laborantaj ĉe montego
7700 m. alta

akiri bezonatajn produktaĵojn de la internaj regionoj, la tibetanoj devis pagi tre kare, kaj eĉ tiel la bezonoj ne estas ĉiam akireblaj. Ekzemple, tiam oni devis doni kelkajn kilogramojn da lano por akiri unu kilogramon da teo. Depost la liberiĝo en 1951, la ŝtato fondis komercan kompanion en Tibeto, kaj ĝi alportis el la internaj regionoj grandajn kvantojn da varoj, por tibetanoj. La ŝtato ankaŭ fiksas raciajn prezojn kaj tiamaniere plialtigis la aĉetpovon de la tibetanoj, por ke ilia vivo pliboniĝu.

En la pasinteco, en Tibeto ekzistis neniu lernejo kaj eĉ ne unu kuracejo kun modernaj ekipaĵoj. Post la liberiĝo nun jam estas unu mezlernejo en Lhasa kaj pli ol 70 elementaj lernejoj diversloke kun pli ol 6,000 gelnantoj entute. Dank' al la helpo de la ŝtato, kompiliĝis lernolibroj en la Tibeta lingvo, kio ebligas al la Tibetaj geknaboj kaj gejunuloj ricevi modernan edukon kaj havigi al si modernan kulturon.

La disvolvo de higiena laboro alportas des pli grandan bonon al la Tibeta popolo. En la pasintaj



Veterinaroj helpas al Tibetaj paŝtistoj en malproksimaj distriktoj imunigi la brutojn

ok jaroj, la ŝtato fondis en Lhasa, Ŝjekaz kaj Ĉangdu bone ekipitajn popolajn hospitalojn, kaj multajn kuracejojn en aliaj Tibetaj urbetoj. Krome en la vilaĝoj laboradas ankaŭ multaj ambulancaj trupoj, kiuj ofertas senpagan kuracadon al la mal-sanuloj. Multaj tibetanoj prezentis Katak-on aŭ aliajn memorigaĵojn al la kuracistoj kaj ilin nomas

Ĉinio. Ĝuste kiel la Tibeta popolo diris, "Nia unueco estas tia kia inter lakto kaj akvo." La ambicio de la reakciularo subfosi la solidarecon inter ni por daŭrigi sian feŭdisman ekspluatadon kaj sklavigan regadon restos eterne nur ilia revo.

* *Katak-o—peco da silkajo per kies prezento la tibetanoj montras sian respekton kaj bonvolon.*

Gong Ce:

Kiu meritas la simpatian

— Korespondaĵo el Lhasa post la fiasko de la reaktia ribelo —

LHASA, la urbo kiu situas sur la "monda tegmento", je pli ol 3,600 metroj super la marnivelo, altiras hodiaŭ la atenton de la tuta terglobo. Ĉiuj zorgas pri ĝi: iuj ĝin benas, dum aliaj ĝin "priploras" kun la bonkoreco de "kato lamentanta pri la morto de rato".

Post la fiasko de la ribelo en Lhasa, oni povas vidi, ke la loĝantoj de la urbo estas tre okupataj por sia nova vivo. Iuj purigas la stratojn, iuj semas legomojn. Frumatene, ĉe renkontiĝo la Tibetaj maljunulinoj salutas per kapbalanco. Ili disŝutas kalkan pulvoron antaŭ la pordoj—simbolo

de feliĉo kaj bonsorto. La geknaboj estas tre familiaraj kaj helpemaj en ĉia laboro. En la ĉirkaŭurbo, la kamparanoj ligas sur bovkornoj ruĝajn kvastojn, kiuj reprezentas fortunon, kaj sin okupas en la printempa plugado kaj semado.

La religia vivo de la loĝantaro daŭras kiel antaŭe. Sur la stratoj, oni povas vidi maljunulinojn sidantaj kaj preĝantaj ĉe la pordoj. La lamaoj de Culakang-templo preĝas kaj kotoŭas* kiel kutime.

* *Kotoŭ-i—altrespekte kliniĝi kun kapo tuŝanta la teron.*



Katenoj uzitaj de la estinta loka registaro de Tibeto

Unu dommastrino diris al ni, ke ŝia familio neniam interrompis sian religian vivon de post la fiasko de la ribelo. Ek de tiam, la ruĝa standardo de kvin steloj ĉiam flirtas super la konstruaĵoj. Samtempe, estas videblaj ankaŭ diverskoloraj kaj diversspecaj budaismaj flagoj, flirtantaj super preskaŭ ĉiuj loĝejoj.

La batalantoj de la Popola Liberiga Armeo montris ekstreme grandan paciencon kontraŭ la provokoj de la ribeluloj. Ili estis ordonitaj kontraŭ-

ataki nur kiam la ribeluloj elprenis el siaj deponoj maŝinpafilojn kaj obusojn fabrikitajn en eks-terlando kaj komencis pafi kontraŭ ili, kaj kiam la espero de paco fine elvaporigis. Sed, eĉ en tia kazo, ili faris ĉiujn eblojn kaj grandan precizecon en la pafado por eviti la detruon de konstruaĵoj. Estas vere, ke troviĝas kuglaj postsignoj ĉirkaŭ la fenestroj de la konstruaĵoj kie koncentriĝis ribeluloj. Sed temas ĝuste pri la lokoj el kiuj la batalantoj de la Liberiga Armeo kaptis plej multajn ribelulojn. La famekonata Gjundeling-templo de Lhasa havis origine nur 109 lamaojn, sed tie estis finfine kaptitaj pli ol 600 ribeluloj, ĉar ĝi servis kiel ribelula ĉefstabejo. Aliflanke, la Transporta Centro ĉe Lhasa, de Kinghaj-Tibeta Ŝoseo, la Officejo de Lhasa kaj ceteraj institucioj kaj entreprenoj suferis terurajn detruojn fare de la ribeluloj. La ribelaj banditoj atakis tri fojojn per maŝinpafiloj kaj bombkanonoj al la Transporta Centro, sed la civila milico de la Centro, formita el konduktoroj, heroe rezistis kaj forpuŝis la atakantojn. La ribeluloj atakis eĉ oficejojn tiajn kiaj estas la Tibeta filio de Hinhua Informa Agentejo kaj la Eldonejo de Tibeta Tagjurnalo. La redaktoroj kaj jurnalistoj, tibetanaĵoj kaj han-aj, persiste defendis kune sian redaktejon dum pli ol unu horo. La kugloj flugis en la ĉambrojn; la ribeluloj boris la murojn kaj penetris en la korton. Unu domo estis forbruligita de la ribelaj banditoj. Fine la batalantoj de la Liberiga Armeo alkuris kaj ilin disbatis.

La urbanoj de Lhasa tage kaj nokte preĝadis por la postmorta feliĉo, sed antaŭ sia morto ili suferis nehoman vivon sub la kruela regado de la reakcia kliko de la supera socitavolo.

Mizeruloj sur strato de Lhasa



Kiam ni atingis Damsung, je 170 Km. for de Lhasa, ni vidis, ke la tieaj tibetanoj estas tre ĉifone vestitaj. Poste ni sciigis, ke, kvankam Damsung kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj estas unu el la plej fekundaj paŝtejoj en Tibeto, sed pro la kruela ekspluatado, ĝia loĝantaro vivis tre mizere. Oni povas pensi, ke la kondiĉoj en la kamparo estas eble pli malfacilaj; kaj certe alie estas en Lhasa. Tamen la fakto montris, ke la ordinaraj loĝantoj en Lhasa impresas same mizere kiel en Damsung. En la urbo de Lhasa troviĝas granda nombro da malriĉulaj loĝejoj kie interprete vivas la tiel nomataj "plebanoj" en ĉifonaj tendoj, ĉirkaŭataj de malorde amasigitaj malpurajoj. Kun piedoj nudaj, kapo dishirtigita kaj en vestoj ĉifonaj kaj malpuraj, ili montris kordolorigan mizeron kaj malriĉecon.

Sed la loĝantoj de Lhasa diris la ni, ke ilia nuna stato estas tamen multe pli bona ol antaŭ la liberiĝo. Spite ĉiaspecajn malhelpojn, la Popola Liberiga Armeo faris multajn bonajn aferojn por la popolo de kiam ĝi eniris en Tibeton antaŭ ok jaroj. Unu lamao de Ĝepung-templo rakontis al ni ke la Liberiga Armeo malfermis kulturejojn kiuj ilin provizas per legomoj, starigis popolajn hospitalojn kie oni ricevas senpagan kuracadon,

Sub la reakcia reĝimo funkciis en Tibeto kruela servuta servo "Porti la sinjorojn".



kaj konstruis ŝoseojn, dank' al kiuj ili ne plu bezonas piediri longan kaj malfacilan vojon por iri hejmen. Post la fiasko de la ribelo, parto de malriĉuloj kaj servutuloj ricevis helpon de la Komitato de Milita Kontrolo; tiuj laborkapablaj eĉ ricevis okupon.

En la lastaj ok jaroj de post la liberiĝo, la estinta reakcia Tibeta loka registaro faris nenion bonan por la vastaj popolamasoj tie. Male, kiam la Tibeta Laborkomitato de Ĉina Komunista Partio kaj la Komandejo de Tibeta Milita Regiono de Popola Liberiga Armeo disdonis helpaĵojn kaj por-agrikulturajn pruntaĵojn al la popolamasoj, ofte okazis ke unuflanke la popolamasoj ricevas semojn kaj aliflanke la reakciuloj jam ilin derabas de la popolamasoj. Pli sovaĝe estas, ke la reakcia kliko de la supera socitavolo de Tibeto konservis ankoraŭ sensanĝe la reĝimon pli kruelan eĉ ol tiu de la mezepoko en Eŭropo. La deksex-punkta kriminala kodo, kiun la estinta Tibeta loka registaro aplikadis ĝis la fiasko de la ribelo por subregi la popolon, estas malnovaĵo de pli ol mil jaroj. Dum la subigo de la ribelo, la Liberiga Armeo kaptis multe da torturiloj uzitaj de la estinta Tibeta loka registaro kaj la reakcia kliko de Tibeta supera socitavolo, inter kiuj estas instrumentoj por elkavigi okulglobojn, detranĉi nazon, tranĉi abdomenon kaj elŝiri koron. Unu speco de instrumento por elkavigi okulglobojn estas farita el ŝtono, cirkloforma, oni metis ĝin sur la kapon de la viktimo kaj frapis martele al la kaposupro, tiel ke elstariĝis la okulgloboj, kiuj estis do eltirataj per ferhoko. Kruelege!

La homoj de la kvindekaj jaroj de la dudeka jarcento havas preskaŭ nur abstraktan koncepton pri la vorto "kolkateno", kies imitajon oni povas vidi nur sur la kolo de la kompatinda malliberulino en Pekina opero "Jutangĉun". Sed en Lhasa, ĝi estis ordinarajo. Tie estis trovita granda nombro da lignaj kolkatenoj kaj piedkatenoj, kies krueleco multe superis tiun priskribitan en historiaj operoj. Estas unu speco de ligna kateno, farita el arbotrunko, kiu longas pli ol kvar metrojn kaj pezas centojn da kilogramoj. La trunko estas segita laŭlonge en du pecojn, inter kiuj estas faritaj truoj por enteni homajn krurojn. Kvin viktimoj povas esti katenitaj per unu "trunka kateno". Tage ili staras kun 10 piedoj senmove katenitaj en la peza ligno; nokte la trunko estas turnita kaj kuŝas ĉiuj kvin personoj sur malseka tero por dormi. Tia stranga torturo estas neniam antaŭe aŭdita. Pli kruela tamen estas la ligna kaĝo, en kiu la viktimo devas stari senmove, kun kapo ekstere. Poste oni metas sur la kapo ŝtonan ĉapon kiu pezas 15 kilogramojn. Sub tia sovaĝa torturo la viktimo ĝenerale mortas post unu aŭ du tagoj. Nun tiaj malhumanaj torturiloj estas kolektitaj de la Tibeta popola juĝejo kiel e-

lokventa atesto pri la kruela regado de la reakcia kliko de Tibeta supera socitavolo. Ni vidis tie, ke la ŝtona cirklo, uzita por elkavigi okulglobojn, jam glatiĝis en la interna flanko pro longa uzado.

Post la fiasko de la ribelo, laborgrupo, sendita de la Komitato de Milita Kontrolo al la norda kvartalo de Lhasa, trovis ke en grupo de loĝantoj konsistanta el dekoj da familioj ne povas elektiĝi eĉ unu sanulo por esti grupestro, ĉar el la maturuloj de tiu grupo ĉiuj estis aŭ lamaj aŭ blindaj. Multaj el ili kripliĝis pro la turmento de la reakciaj regantoj kaj nobeloj. Sur la stratoj de Lhasa oni povas ofte trovi diversajn kriplulojn.

Ni faris viziton al Gjundeling-templo, kie ni vidis juĝsalonon, speciale destinitan por virinoj. Timiga, harhirtiga atmosfero regis en la ĉambro, en kiu dense viciĝis torturiloj kaj ŝnuroj. En la centro de la salono kaj ĉe la muroj staris diversaj terure timigaj statuoj. Dum nia vizitado, sur la dekstra muro pendis ankoraŭ detranĉita virina brako, jam sekiĝinta, kun maldikaj kaj longaj fingroj kaj ungoj blankiĝintaj. La malhumanajo indignigis ĉiujn vizitantojn. Oni tamen ne forgesu, ke starigo de neoficialaj juĝejoj en temploj kie ĉiutage oni preĝas, estis rigardataj kiel io natura kaj

racia; kaj plie, ĝi estas eĉ postulata konserviĝi por ĉiam kaj testamentata de generacio al generacio kiel "neŝanĝebla" sankta sistemo.

Lhasaanoj rakontis al ni alian teruraron: En Tibeto ekzistas du skorpiaj kavernoj, unu en Montsuda regiono, alia sub Potala-palaco. Oni diras ke tiu en Montsuda havas jam historion de mil jaroj. Ĝi estis destinita por puni la "krimulojn". La kaverno estas malluma kaj plena de skorpioj. Kiam la viktimoj estas enjetitaj en ĝin, ili tuj estas pikataj de la malsataj kaj furiozaj skorpioj ĝis morto. Post la fiasko de la ribelo, laborgrupanoj de la Komitato de Milita Kontrolo malkovris la alian skorpian kavernon sub Potala-palaco. Pro la ekvarmiĝo de la vetero, ili jam kaptis el ĝi kelkajn skorpiojn.

Amikoj kun vera bonkoro en la mondo, kiamaniere vi montros vian simpatian antaŭ tiuj teruraj faktoj?

La reakcia kliko de Tibeta supera socitavolo faris el Tibeto surteran inferon sub sia regado. Sed hodiaŭ ĝiaj krimoj estas malkaŝitaj antaŭ la mondo. Ni benas niajn karajn Tibetajn fratojn pro ilia akiro de nova vivo. Ni ĝojkrias pro tio, ke ili havos paradizon jam dum la surtera vivo.

Zong Zi-du:

Medalo kaj Pelto

ESTAS dezerta kaj sovaĝa intermonto. Supre serpentumas malnova kuriervojo sur la altebenaĵo kovrita per ŝtonetoj. La hufferaj postsignoj de rapidanta ĉevalo, kiuj aperis sur la kuriervojo etendiĝis rekte okcidenten kaj ankoraŭ ne estis kovritaj de la neĝblovado, indikis ke la rajdanto pasis antaŭ nelonge. Kiu trarajdis tiun ĉi solecan kuriervojon en tiel severa neĝblovado kaj tiel urĝeme?

Ĉiam pli densiĝis la neĝo, kaj ĉiam pli forte blovis a vento. Dume, Panbulhaĝon, kune kun siaj filo kaj filino, suferis la atakon de severa frostoj en nigra tendo el bovharoj, starigita ĉe montpiedo oriente de la valo.

"Ĝajang, blovu kaj vigligu la fajron. Vidu, kiel via fratino senĉese tusas de frostoj," diris la patrino al sia filo, dum ŝia maltrankvila rigardo falis sur sian kvinjaran filinon Cedan, kiu kuŝis sur la kuseno apud ŝi, sub eluzita ŝafpelto, preskaŭ senhara kaj kun granda flikaĵo dorsflanke. Tusadis

Cedan, kies malgranda vizaĝo estis tute ruĝa de febro.

La dekjara Ĝajang rampis kaj blovis tra la aperturo de la forno, kiu troviĝis ĉe la mezo en la tendo. Tiu malriĉa paŝtista familio eĉ ne havis ŝafofelan blovilon! Densa fumo elŝpruciĝis el la aperturo, kaj tiel pikis la okulojn al la etulo, ke li daŭre larmis. Tamen, dank' al a obstino de la infano kun larĝe malfermitaj nigraj okuloj, la humida bovfekajo* finfine ekbrulis kun verdaj flamoj. Nun, flueto da varmo estiĝis en la tendo.

La patrino konsciis, ke estas jam tempo por tagmanĝo. Ŝi metis "ĝamba"**, sekigitan sovaĝlegomon kaj acidan laktfeĉon kune en teran poton,

*Bovfekajo—Tibetanoj uzas ĝin sekigitan kiel hejtajon.

**Ĝamba—sovaĝa greskaĵo kun ruĝaj fruktetoj. Malriĉaj Tibetaj paŝtistoj ĝin kolektas, sekigas kaj muelas kiel manĝaĵon.



PLA-anoj portas akvon por tibetanino, al kiu mankas laborkapablulo.

por kuiru ilin en kaĉon. La maldensan acidan kaj piggustan kaĉon fervore frandis ŝmacante Ĝajang, kaj fine traiekis la malgrandan lignan manĝvazon tute pura.

“Panjo, tuj kiam ĉesos neĝi,” diris la malgranda Ĝajang, viŝante al si la buŝon, “mi iros elfosi ‘ĝolma’ *** por vi kaj la fratino.”

La patrino tiris Ĝajang al sia brusto kaj delikate forviŝis cindron de bovfekaĵo de sur lia vango, kaj diris ameme: “Ne eliru, mia bona infano. Vi malsaniĝos de malvarmo, ĉar vi ne havas pelton. Ĉu via fratino ne malsanas ĝuste pro tio, ke ŝi iris kun vi elfosi ‘ĝolma’!”

Malgranda Ĝajang, ekmeditis kaj subite demandis sian patrinon: “Diru, panjo! kial mi ne havas eĉ ĉifonan pelton, dum iuj ricevas ĉiuvintre novan?”

La patrino sciis, pri kiuj aludas lia “iuj”. Tra la fendo de la tendo, ŝi rigardis suden. Ŝtona duetaĝa domo alte staras tie sur la proksima montdeklivo. La domo, la parolo de la filo kaj la frostmalsana filineto vekis en la koro de Panbulhaĝon doloron kaj indignon. Ŝi rememoris pri sia edzo, la patro de tiuj ĉi infanoj, kiu laboregis dek jarojn ĉe la sinjoro, ĝis li mortis de elĉerpiĝo kaj malsaniĝo, kaj ne sukcesis havigi al si ian ŝafpelton.

“Infano, nun la mondo ŝanĝiĝis. Kiam vi fariĝos plenaĝa, vi havos multajn novajn peltojn.” Ŝi estis kuraĝigata de la nova espero. La Popola Liberiga

****Ĝolma* — Radiko-tubero dolĉa kaj nutra de iu sovaĝa kreskaĵo en Tibeto.

Armeo jam venis, ĉiuj infanoj certe havos peltojn estonte.

Tamen, la virino efektive bezonis pelton ĝuste nun, por ke ŝi kaj ŝia filo povu alterne ĝin porti kaj eliri por trovi manĝaĵon.

Panbulhaĝon intencis pruntepreni eluzitan lankovrilon de onklino Ĝolgar, kiu loĝis ne malproksime. Ŝi transiris malgrandan montdeklivon kaj venis al ŝia tera domo. Ĝuste kiam ŝi deziris eniri por iom varmiĝi, ŝi eksuspiris, ĉar ŝlosita estas la pordo. Kie estas la onklino? Kun malbonhumoro de elreviĝo ŝi returnen iris, sed ne laŭ la ĵus irita vojo ĉar por malsupreniro laŭ la de-

klivo la vojo estas glitiga. Ŝi ĉirkaŭiris supren laŭ la kuriervojo ĉe la supro de la intermonto.

Ŝi iris rapideme sur la kuriervojo, ŝirmante per la maniko sian vizaĝon kontraŭ la neĝo alblovata. Tiel ŝi iris kaj iris. Subite ŝi retiriĝis je kelkaj paŝoj kaj apenaŭ detenis sin de ekkrio. Proksime de ŝi tie sur la kuriervojo, kuŝis iu homo kuntiriĝinte kaj senmove, plene kovrita de neĝflokoj. Kiam ŝi sin ekregis tuj kuraĝe alproksimiĝis kaj ekrigardis, jen ŝi trovis, ke ne estas frostmortinto, sed dika pelto.

“Dio ja helpas min!” Ŝi prenis la pelton kaj ekiris. Sed ŝi haltis post kelkaj paŝoj kaj sin demandis: “Kies pelto ĝi estas? Ĉu mi rajtas ĝin preni?”

“Ne gravas, al kiu ĝi apartenas. Ĉiurilate, mi ja trovis ĝin sur la vojo. Tio neniel povas esti ŝtelo.” Tiel pensante ŝi denove ekpaŝis.

Sed apenaŭ post kelkaj paŝoj, ŝi ree haltis. Ŝi ekzamenis la pelton. Ĝi estis blanka kaj mola pelto kun verdkatuna eksteraĵo kaj brunaj butonoj. Tibetano ne havas tian pelton, sed nur ano de la Liberiga Armeo.

Ekpensante pri la Popola Liberiga Armeo, la okuloj de la virino ekbrilis kaj ŝia koro varmiĝis. Propraokule ŝi konstatis, kiel Tibeto ŝanĝiĝis post alveno de la PLA.

Inter la montegoj kaj torentoj, ŝoseo kaj pontoj estas konstruitaj. La “feraj bovoj” (aŭtomobiloj), neniam viditaj antaŭe, alportas multe da enlandaj produktoj; sur la dezertaj lokoj ie stariĝis novaj domoj, kaj ie aperis agrikulturaj kampoj; la mal-

riĉaj infanoj ankaŭ havas ŝancon viziti lernejon; malsanaj homoj kaj brutoj ricevas senpagan kuracadon. . . . Sed precipe ne forgesiĝu por la virino estis la jena okazintaĵo:

En unu nuba vespero lastjare, tri vojaĝantaj soldatoj de la PLA venis al la intermonto por tranokti. Panbulhaĝon konsilis ilin iri al la domo de la kapulo†, ĉar tie ili ricevus vastan spacon kaj ankaŭ freŝan lakton. Sed la PLA-anoj tion decide ne preferis, ŝi do ordigis angulon en la tendo por ilia ripozado. Ŝi bedaŭris multe pro tio, ke ŝia tendo estas tro kaduka, sed samtempe ĝojis en la koro, ke la soldatoj intimas kun Tibetaj malriĉuloj.

En la nokto ekpluvegis. Meznokte la montakvego torentis malsupren, kaj tuj englutis la malgrandan nigran tendon. Panbulhaĝon sukcesis elbarakti kun la malgranda Cedan en siaj brakoj al altejo, sed la malgranda Ĝajang ruliĝis en la akvon svingante la brakojn kaj kriis: "Panjo! Panjo!" La kruela torento minacis baldaŭ forrabi lian vivon antaŭ ŝiaj okuloj. Kiam Panbulhaĝon estis demetonta sian filinon por savi la filon, ŝi vidis ke tri PLA-anoj jam kuregis al Ĝajang.

Ĝajang estis savita, dum la tri soldatoj estis tutkorpe kovritaj de ŝlimo, iliaj membroj estis tie kaj ĉitie vunditaj de ruliĝantaj ŝtonoj en la torento, kaj sangis la kruroj.

.....

Panbulhaĝon hezitis kun la pelto en la manoj. Kiom multe la PLA-anoj ĉiutage faras bonon por la Tibeta popolo! Kion fari, se li frostmalsaniĝus sen la pelto? Ŝi intencis remeti la pelton al la loko, kie ŝi trovis ĝin, sed ŝi timis ke iu el la kapula familio povus ĝin trovi kaj forporti. Fine ŝi decidis atendi, pensante ke la soldato kiu perdis sian pelton certe revenos ĝin serĉi.

Ŝi etendis la pelton sur sian dorson kaj sidiĝis malantaŭ roko kiu ŝirmis ŝin kontraŭ la vento, direktante sian rigardon okcidenten al la blanke vestita montego Gogarla. Ŝi estis tre maltrankvila de la penso: Kiel statas nun la malgranda febranta Cedan? Ĉu Ĝajang elŝtelis el la tendo por elfosi "ĝolma"? Ĉu la fajro en la tendo ne jam estingiĝis? Ĉu la soldato, kiu perdis la pelton, ne frostmalsaniĝis de la malvarmo?

Post la granitamaso ĉe la piedo de Gogarla, aŭdiĝis rapida klakado de hufferoj, kiu vekis la virinon el medito. En palpebruma daŭro juna soldato jam staris antaŭ ŝi. La junulo portis malnovan vatitan uniformon, kun karabeno pendanta sur la dekstra ŝultro. Liaj vangoj estis tute ruĝaj de la malvarmo, kaj la viziero de lia kepo estis

†Kapulo—loka feŭdalisma ĉefo en Tibeto, estranta la tribon.

dike kovrita de neĝflokaj, ke despli kontraste reliefigis la surkepa ruĝa insigno kun la ideografiaĵoj "ok unu"‡. Post li staris granda nigra ĉevalo spireganta kun levita kapo kaj ŝaŭmeroĵ ŝprucataj ĉe la buŝo. Ŝajnis ke li estis kavaleria komunikisto kun urĝa komisiono.

Panbulhaĝon stariĝis kaj donis la pelton al la soldato. La lasta estis surprizita kaj el liaj okuloj radiis miro kaj ĝojo. Evidente, la konduto de tiu ĉi mizera Tibeta virino kortuŝis lin.

La komunikisto elprenis kelkajn arĝentajn juanojn†† el sia poŝo por rekompenci ŝin, kiu, tamen, rifuzis skuante la kapon. La soldato ekruĝiĝis de honto. Kiel povas la profunda amikeco kaj amo de la Tibeta popolo por la Popola Liberiga Armeo esti pagata per mono!

La juna armeano subite forprenis de sia brusto la medalon kun la figuro de Prezidanto Maŭ, kaj ekpreninte la pozon de atento, prezentis ĝin per ambaŭ manoj al Panbulhaĝon.

Panbulhaĝon ridetis. Ŝi akceptis la medalon, alfiksis ĝin al sia brusto, kaj kuris emociite al sia tendo. La vento blovegis, sed ŝi jam forgesis la malvarmon.

Ŝi kuris, dezirante tuj rakonti al malgrandaj Ĝajang kaj Cedan pri la ricevo de donaco centmilfoje pli varmiga ol pelto.

‡"Ok unu"—Aŭgusto-unua, la dato de la fondiĝo de la Popola Liberiga Armeo (PLA).

††Juano—ĉina mono=100 cendoj.

Al legantoj de El Popola Ĉinio en Sovet—Unio

Junulara Esperantista Grupo "Fajrero" kaj Esperantista Rondo ĉe Granda Soveta Enciklopedio organizas

Traduk — konkurso

Se vi deziras partopreni ĝin, traduku unu el artikoloj, montritaj sube, kiujn vi trovos en ĉi numero de nia gazeto.

Sendu la tradukon al jena adreso: **Moskva, poŝtkesto 1004, Esperanto, Raisa Goldberg (traduk-konkurso).**

La tradukoj estos ekzamenataj kaj korektataj de spertaj esperantistoj. Ĉiu tradukinto ricevos recenzon.

Plej bonaj tradukoj estas premiotaj per valoraj libroj.

Unua tasko: *Kanto de la edzino (paĝo 126)*

Dua tasko: *La maljuna ĉeflaboristo (paĝo 128)*


Aŭto-industrio en Ĉinio

EN la jaro 1956, la Unua Aŭto-fabrika en Ĉang-cun en Gilin-provinco komencis produkti "Liberigo-aŭtojn". Tio finis la historion sen aŭtofabrikado en Ĉinio. Kaj la granda impetado en 1958 plie kreis aŭtoprodukton multspecan. En tiu jaro krom la "Liberigo-aŭtoj" de la Unua Aŭto-fabrika, grandskale produktiĝis ankaŭ la "Impeto"-j el Nankino kaj jipoj el Ŝanhajo. Krome ja estas sennombraj aŭtoj prove kaj malgrandskale fabrikitaj! Multaj estas baptitaj per samaj nomoj. Kiam diskonigis la sukceso pri provfabrika de la aŭtomobilo kun marko "Orienta Vento" en la Unua Aŭto-fabrika, iu fabrika en Anŝan, laŭdire, ankaŭ per tiu nomo nomis la sian.



Laŭ takso, de marto ĝis decembro de la pasinta jaro, po unu kaj duona tagoj oni provfabrikis unu novan specon de aŭtoj.

Multiĝis ne sole la markoj sed ankaŭ la specoj: divers-tipaj ŝarĝaŭtoj de 1.5 tunoj ĝis 5 tunoj, 6 × 6 ŝarĝaŭto, transkampa ŝarĝaŭto, tiraŭto, aŭtomate deŝarĝa aŭto, agrikultura aŭto, duŝaŭto, ankaŭ aŭtobuso, aŭtomobilo, jipo, trirada aŭto, liliputa aŭto ktp.

La kvanto de aŭto-produktado duobligis en 1958, kompare kun tiu



Triaksa ŝarĝaŭto (supre) kaj aŭtomobilo produktita de la Unua Aŭto-fabrika en Ĉangcun



"Fenikso" produktita de Ŝanhaja fabrika

en 1957. Per la aŭtoj, kiujn produktis la Unua Aŭto-fabrika en la pasinta jaro, oni provizis pli ol tri mil organizojn kaj multe plifortigis la trafikadon en urboj kaj vilaĝoj, ankaŭ multe kontribuis al la produktado de ŝtalo kaj fero. Antaŭ la Printempa Festo (Novjaro laŭ ĉina lunkalendaro) la liliputa aŭto fabrikitaj en Ŝanhajo komencis eksperimente

la loĝantojn priservi sur la stratoj de Ŝanhajo, kiel taksioj.

La kuranta jaro 1959, estos la jaro de pli granda antaŭensalto en ĉiuj fakoj de la nacia ekonomio de Ĉinio. La aŭto-industrio ankaŭ faros pli grandan salton. Kvante oni duobligos tiun de la jaro 1958. Koncerne al la specoj, oni koncentrigos la fortojn super la plej bonaj tipoj elektitaj el la jaro 1958 kaj forlasos la tipojn similajn kaj malpli bonajn laŭ teknika kaj ekonomia normoj. Ekzemple, estis pli ol dudek tipoj de aŭtomobiloj provfabrikitaj en grandaj kaj malgrandaj fabrikoj en la tuta Ĉinio en la jaro 1958, sed post model-determina provado en kuranta jaro, estis elektitaj definitive por granda produktado nur jenaj kelkaj specoj: "Ruĝa Flago",

“Pekino”, “Orienta Vento”, “Paco” ktp. Krom la aŭtomobilo, laŭ la materialaj kondiĉoj kaj bezonoj de nia lando, oni donos sufiĉan atenton al la projektado kaj produktado de la t. n. “simplaj” aŭtoj. Ĉar ilia strukturo estas simpla, la materialo — malmulta, kaj la fabrikado — pli facila. Post grandskala produktado en diversaj lokoj, tiuj simplaj aŭtoj multe kontribuos al la ege streĉa trafikado kaŭzita de la granda impetado industria kaj agrikultura. En la tekniko, oni unufanke daŭros marŝi al la pinto de moderna tekniko aŭtoindustria, aliflanke ankaŭ resumos kaj disvastigos la spertojn de diversaj lokaj teknikoj kaj metodoj. Ekzemple, oni uzas la bul-feron por fabriki krank- kaj kam-*

* *Kamo*—levbrako aŭ nazo ĉe disko, plej often aranĝata sur rotacia akso.

ŝaftojn, kaj uzas plastikon anstataŭ metalon por fabriki la aŭtajn pecojn ktp. Antaŭnelonge la Unua Aŭto-fabriko sukcesis provfabriki unu sen-nikelan aŭton. Tio kreis favoran kondiĉon, por ekskluzivi uzadon de nikela alojo en aŭtoindustrio.

Liliputaj aŭtoj fabrikitaj en Ŝanhajo



Gaŭ Juan:

La Granda Antikva Kanalo en Rekonstruado

LA Granda Kanalo de Pekino ĝis Hangĝoŭ, estis la aorto de trafiko inter la nordo kaj la sudo en antikva Ĉinio. Ĝi ankaŭ estas la plej longa kanalo en la mondo. Nuntempe, laŭlonge de la kanalo, miloj da kamparanoj energie laboras por ke la antikva kanalo obstrukcita dum pli ol cent jaroj pli frue refunkciu, kaj ŝipoj veturu senbare inter Pekino kaj Hangĝoŭ.

Tiu ĉi granda kanalo, kiu estas tiel fame konata kiel la Granda Muro, estis konstruata ekde la Epoko de Printempo kaj Aŭtuno (722-481 a. K.), antaŭ pli ol 2,440 jaroj. Post tiam, dank' al la energia laborado de laboruloj en sinsekvaj dinastioj, la kanalo en la jaro 1292 rekte interligis Pekinon kaj Hangĝoŭon kaj fariĝis granda rivero je pli ol 1,700 kilometroj longa trafluanta la provincojn Hebej, Ŝandong, Ĝiangsu kaj Ĝegiang.

En la periodo de feŭdalismo, la fame konata granda kanalo estis uzata ĉefe por la trafiko de

milita celo kaj transportado de imposta greno en servo al la reganta klaso. Ĝi ankaŭ ludis gravan rolon en akcelado de ekonomia kaj kultura disvolviĝo. Tamen, de tiam, la Flava Rivero ŝanĝis sian vojon en 1855, parto de la kanalo en Ŝandong-provinco fariĝis ne trairebla pro obstrukco. La

Parto de la kanalo en Ŝandong-provinco jam ne traveturebla





La parto en Giangsu-provinco estas larĝigata kaj profundigata.

reakciaj regantoj tute ne sin ĝenis por ĝin plibonigi, tial pli kaj pli fatale obstrukciĝis kaj fine la tuta kanalo distranĉiĝis en multajn partojn: ne plu tranavigebla inter Pekino kaj Tiangin, la parto en Hebej-provinco navigebla nur en certa distanco, en la regiono de Giangsu- kaj Ĝegiang-provincoj navigebla nur por malgrandaj vaporŝipoj kaj velŝipoj.


Post la liberiĝo en 1949, sekve de la restarigo de nacia ekonomio kaj la disvolviĝo de produktado, multaj sekcioj de la kanalo estis dragitaj, riparitaj, kaj novtipaj kluzoj kaj naĝobareloj estis konstruitaj tial la trafiko sur la kanalo denove prosperiĝis. En 1955, adoptiĝis la tren-metodo por transporto, t. e. treni multajn flosojn per unu vaporŝipo, kaj en multaj sekcioj de la kanalo ofte aperas trenataj ŝiparoj mil-metre longaj.

Kvankam la popola registaro multe klopodis plibonigi la trafikon de la kanalo, sed, konsiderate laŭ la nuna vasteco, profundeeco kaj teknikaj kondiĉoj, ĝia traveturebleco tute ne akordiĝas kun la


rapida disvolviĝo de la ekonomia konstruado de socialismo. Precipe post la saltego de la produktado en industrio kaj agrikulturo en Ĉinio, oni des pli urĝe bezonas pli-grandigon de la kanalo. Pro tio, la popola registaro decidis ke la konstrua laboro de pligrandigo de la tuta kanalo estu efektivigita sekcion post sekcio en la periodo de la dua kvinjarplano (1958-1962). Post la pligrandigo, la longeco de la Granda Kanalo atingos 1515 kilometrojn.

Post la rekonstruo, la Granda Kanalo interligiĝos kun la kvin riversistemoj de Haj-rivero, la Flava Rivero, en norda Ĉinio, Huaj-rivero, Jangzi-rivero en la centra parto de la lando kaj Kiantang-rivero en la orienta parto, kaj tiel kunligos la grandajn kaj malgrandajn riverojn de dek unu provincoj formante reton de rivertrafiko kaj en pli ol duono de la teritorio de Ĉinio oni povos interkomuniki per ŝipoj. Tiam, oni povos de Pekino veturi al Hangĝoŭ per grandaj vaporŝipoj. La grenon de Siĉuan-provinco oni ankaŭ povos trans-

Finkonstruiĝis la kluzo en Suĝoŭ-gubernio, Giangsu-provinco, kiu estas unu el la pli ol 20 kluzoj de la Kanalo.



porti rekte al Pekino surrivere. Tiam, ne nur la grandaj kaj malgrandaj ŝiparoj en enlandaj riveroj ne bezonos transŝarĝadon, eĉ marŝipoj de 3000 toneloj povos rekte iri al Pekino de Jangzi-rivero aŭ marbordo kaj ŝarĝi aŭ malŝarĝi en la Pekina haveno. Estas antaŭvideble ke la Granda Kanalo transportos ĉiujare kelkajn dek milionojn da tunoj de ŝtonkarbo, minaĵoj, konstruaj materialoj, grenoj ktp., kaj la kvanto de transporto ankoraŭ pli multiĝados en la estonteco.



La parto en Jangĝoŭ-gubernio, Giangsu-provinco jam estas pligrandigita.

Post la pligrandigo, la pli grava funkcio de la Granda Kanalo montriĝos en la plena utiligo de la akvoprovizo. Ĝi provizos akvon al la industrioj de la urboj apud la kanalo, kaj al la najbaraj kampoj por irigacio. Krome, ĝi ankaŭ multe utilos en la defendo kontraŭ inundo kaj tromulta pluvakvo, kaj ebligos eternan foriĝon de inundoj kaj riĉan akvoprovizon por irigacio eĉ sen guto da pluvo en regionoj kie ĝi trapasas.

Laŭlonge de la kanalo oni konstruos ankaŭ ebenajn ŝoseojn kaj multajn hidroelektrajn staciojn. Sekve de la disvolviĝo de la arbara kulturado, la bordoj kovriĝos per fruktodonaj verdaj arbaroj, kiuj donos agrablajn ombrojn sur la bordoj. Tiam tie fariĝos parka zono de Pekino ĝis Hangĝoŭ.

Antaŭe pligrandigo de la Granda Kanalo estis envicigita kiel programero en la trian kvinjarplanon, tamen, por konformi al la situacio de ĉiuflanka

saltego en produktado kaj konstruado, oni plifruigis komencis en 1958. La tuta laboro bezonas elfosi, el la kanallito ses cent milionojn da kubaj metroj da tero, kvaroble pli multe ol Panamo, duoble kaj duonon pli multe ol Suez-kanalo; la cementaj konstruaĵoj de la havenoj estas kelkdekoble pli multe ol tiuj de la du kanaloj. Sed, la tempo por la tuta konstrua laboro estas nur kvinono ĝis duono kompare kun ili (Rimarko: la kanalo Panamo, pli ol 80 kilometrojn longa, estis konstruita en 33 jaroj; Suez-kanalo, pli ol 160 kilometrojn longa, estis konstruita en 10 jaroj).

Ĉiuj laboruloj partoprenantaj la konstruadon vigle laboras kiel tigroj kaj drakoj. Ili elpensas kaj iniciatas multajn bonigajn proponojn, kaj tial aperis sur la konstruejo multaj fosaj kaj transportaj maŝinoj faritaj de ili mem, ke plialtiĝis la laborefiko kaj multe rapidiĝis la konstruado.

Esploroj pri Ĉina Nacia Muziko

En la pasintaj 5 jaroj post sia fondiĝo la Instituto de Ĉina Nacia Muziko organizis pli ol 30 esplorvojaĝojn en diversaj regionoj de Ĉinio por kolekti kolorriĉajn heredaĵojn de la ĉina popola muziko. Oni kolektis pli ol 1,500 muzikilojn antikvajn kaj nuntempajn de diversaj nacioj de Ĉinio, pli ol 500 manskribitajn kaj lignogravure presitajn

muzikokolektojn de antikvaj verkoj, pli ol 20,000 popolkantoj kun muziknotoj kaj multajn rarajn librojn kaj bildojn pri muziko. La instituto eldonis pli ol cent librojn kun riĉaj materialoj altvaloraj por studi la historion de ĉina muziko kaj ankaŭ por disvolvi la modernan ĉinan muzikon, donante al ĝi kondiĉojn por heredi la bonajn tradiciojn de la prapatroj kaj sorbi riĉajn

nutraĵojn el la popola muziko. En la pasinta jaro, la instituto faris esploron pri la nuntempa muzika vivo de la ĉina popolo, kaj eldonis "Popolkantoj de la Granda Impetado", "Muziko de la Nova Kamparo" k.t.p. Nun oni fervore sin okupas pri studado kaj verkado de la historioj de la antikva kaj moderna muzikoj de Ĉinio, kaj studas pri diversaj specialaj problemoj en la nuntempa muzika laboro.

Gi kjun:

Ĉen Ging-kaj—sesfoja rompinto de la monda rekordo

Moskva spektantaro akلامas: “Brave!”

Vespere, la 14-an de aprilo, en la konkurso por Moskva Pokalo de Internacia Individua Ĉampiono de Pezlevo okazinta en Moskvo, Ĉen Ging-kaj eklevi la pezon de 148 kilogramoj. Kaj per tiu eklevo li rompis la mondan rekordon de jetlevo de la plumpeza klaso tenitan de Usona sportisto Issac Berger, kiu levis pezon de 147.5 kilogramoj.

En la konkurso preparolita Ĉen Ging-kaj elpaŝis lasta. En la unua provo, je miro de la spektantoj, li tuj petis pezon de 135 kilogramoj, kiu superis jam ĉiujn levitajn pezojn de aliaj sportistoj el la sama klaso. La duan fojon li levis 142.5 kg. facilstile. Ekvigliĝis tiam ĉiuj spektantoj, iuj eĉ stariĝis de sia seĝo kun scivolemo por vidi, kian rezulton atingos en tiu ĉi vespero. Kiam la anoncisto deklaris ke Ĉen Ging-kaj levos je la tria fojo 148 kilogramojn, ĉiuj entiris longan spiron, tamen spertaj spektantoj de pezleva konkurso jam komencis konkludi: “Sendube, li sukcesos!” Dume Ĉen Ging-kaj malrapide eliris kun firmaj paŝoj. Li surfrotis iom da malglitiga pulvoro sur siajn mankavojn kaj li marŝas al la pezajo. Post profunda enspiro li eklevi la pezajon ĝis sia brusto kaj multaj spektantoj ekaplaŭdis. La juĝisto urĝe mansvingis por kvietigi la publikon. Sed en palpebruma momento Ĉen Ging-kaj jam sukcese levis la pezajon alte super sia kapo. Tiam eksplodis tondra ĝojkrio en la tuta konkursejo kaj stariĝis la spektantoj kun akلامo: “Brave! Brave!”

Sesfoje rompis la mondrekordon


Ĝis nun, Ĉinio tenas 4 mondrekordojn el ĉiuj 7 klasoj de jetlevo kaj Ĉen Ging-kaj sola tenas du.

Dudektrijara, Ĉen Ging-kaj en pli ol tri jaroj jam sesfoje rompis la mondrekordon: La unuan fojon, je la 7-a de junio, 1956, en Ŝanhajo per la eklevo de 133 kilogramoj li rompis la jetlevan mondrekordon de bantam-peza klaso tenitan de Usona sportisto, kiu levis 132.5 kilogramojn, kaj fariĝis la unua rompinto de monda rekordo en Ĉinio. La duan fojon, je la 11-a de novembro, 1956, en Kantono per la eklevo de 135 kilogramoj li plialtigis la mondrekordon starigitan de li mem. La trian fojon, je la 29-a de novembro, 1956, en Ŝanhajo Ĉen Ging-kaj refoje plialtigis la rekordon kreitan de li mem nur antaŭ 18 tagoj ĝis 135.5 kilogramoj. La kvaran fojon, je la 6-a de aŭgusto, 1957, en la III-a Junulara Amikeca Sportkunveno en Junulara Festivalo li levis 139.5 kilogramojn. La kvinan fojon, je la 26-a de septembro, 1958, en la Unua Sportkunveno de Amikaj Armeoj de Socialismaj Landoj en Leipzig, li plialtigis la rekordon de jetlevo de bantam-peza klaso ĝis 140.5 kilogramoj. Kaj la rakontita lasta fojo jam estas la sesa.

“Kial mi sukcesis?”

Antaŭ kelkaj jaroj Ĉen Ging-kaj ankoraŭ lernis en sia hejmloko, Dongguan-gubernio en Guangdong-provinco. Jam de infanaĝo li tre ŝatas sporti kaj pro tio li havas fortikan korpon. En 1955, kiam Ĉen Ging-kaj la unuan fojon partoprenis la Tutlandan Pezlevan Konkurson, lia atingo estis nur 95 kg. kaj nur en daŭro de pli ol tri jaroj lia atingo en la bantam-peza klaso jam pliiĝis je 45.5 kg.

“Kial mi sukcesis? Ĉar konkursante mi pripensis ne pri mi mem, sed pri nia patrio. Tial ekkreskis al mi la kuraĝo, kaj pli firmiĝis la fido de sukceso.” Ofte tiel respondis Ĉen Ging-kaj al demandintoj.



POR PACO EN SUD-AZIO

ANTAŬ 5 jaroj la Ĝenevaj Konvencioj restarigis la pacon en Hindoĉinio surbaze de la rekono al nacia suvereneco, sendependeco, unueco kaj teritoria integreco de la tri landoj en Hindoĉinio: Vietnamio, Kamboĝo kaj Laoso. Sed la Usonaj imperiistoj kun iliaj lakeoj, la kliko Ngo-dinh-Diem intence sabotas kontraŭ la Konvencioj. Ili rifuzadis trakti kun Vietnamia Demokratia Respubliko pri ĝeneralaj balotelektoj por reunuigi Vietnamion. Kontraŭe ili pliintense preparas militon, kontraŭkonvencie importis Usonajn armilojn, venigis Usonajn militajn agentojn, kaj provas tiri Sud-vietnamion en la Sud-orientazian militblokon. Krome la Uson-Diemkliko komencas amasan masakron kontraŭ la patriamaj popolanoj en Sud-vietnamio.

Ĉio ĉi tio estas gravegaj atencoj kontraŭ Ĝenevaj Konvencioj kaj minaco al la paco de Sud-azio kaj de la tuta mondo. Nun la tuta vietnama popolo, ankaŭ la esperantistoj en Vietnamio, indigne kondamnas la fiagojn de la Uson-Diem-kliko kaj celebros la kvinan datrevenon de la subskribado de Ĝenevaj Konvencioj kiel tagon de lukto por nacireunuigo kaj kontraŭstaro kontraŭ la intrigoj de Uson-Diem-kliko. Por tio la Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio

dissendis alvokojn al tutmondaj pacamaj esperantistoj, ke ili subtenu ilian lukton en tiu tago.

Dum la pli ol 10 jaroj post la Dua Mondmilito, la Usonaj imperiistoj ĉie bruligadas kaj incitadas militan fajron, de kio suferas plej multe la Aziaj popoloj: ĝi lanĉis invadan militon al la Korea Popoldemokratia Respubliko, pirate okupis nian insulon Tajvan, etendis siajn ungojn en Sud-vietnamion, kreis ribelon en Indonezio, organizis militan blokon en Sudorienta Azio, minacas la neŭtralecon de Kamboĝo, instigis la registaron de Laoso al enlanda milito, por ne diri pri la sklavigo de la popoloj de Japanio, Tajlando kaj la Filipinoj kaj la plifortigo de la armeoj kaj la milita preparado. Ĉiuj ĉi tiuj nekaŝeblaj faktoj klare montras al ni la esencan militemon de la Usonaj imperiistoj. La paco en Vietnamio estas ligita kun la paco de Azio kaj tiu de la tuta mondo. Subtenante la pacon en Vietnamio, ni subtenas ankaŭ la pacon de la mondo. Ni, ĉinaj geesperantistoj, volonte subtenas tuforte kune kun la pacamaj geesperantistoj en la tuta mondo la movadon de la vietnama popolo por paco kaj unuigo de sia patrolando!

Ĉina Esperanto-Ligo

“La Kajto” Prezentiĝis en Pekinaj Kinejoj

La unua kolora filmo por infanoj “La Kajto” kune farita de ĉinaj kaj francaj kino-laborantoj, prezentiĝis en Pekinaj kinejoj okaze de la Internacia Festo de Infanoj, kaj estis varme akceptata de la junaj rigardantoj. La filmo temas pri amikeco inter ĉina kaj franca popoloj kaj iliaj infanoj (detalon legu en EPĈ. n-ro 2, 1958, sur p. 50), kaj gajnis plurajn premiojn de internaciaj kino-organizoj, inkluzive de la Kino-asocio de Francaj Junuloj. Lastjare ĝi prezentiĝis en Parizo

je la jarfino, kaj estis laŭdata de la rigardantaro.

Biblioteko de Ĉinaj Popolkantoj kaj Popolrakontoj

“Biblioteko de Ĉinaj Popolkantoj” kaj “Biblioteko de Ĉinaj Popolrakontoj” estas kompilataj nun de la Instituto de Ĉina Popol-literaturo. Multaj verkistoj, profesoroj, studentoj kaj popolamasaj organizoj fervore subtenas tiun ĉi laboron. Ĉi tiuj bibliotekoj enhavos ne nur antikvajn popolrakontojn, popolkantojn kaj epopeojn de ĉiuj nacioj de Ĉinio, sed ankaŭ la modernajn folklorajn verkojn de la popolo.

Biblioteko de Valoraj Historiaj Dokumentoj

Por faciligi studadon pri la ĉina moderna historio, la Konservejo de la arkivoj de Ming- kaj King-dinastioj decidis eldoni “Biblioteko de Arkivoj kaj Historiaj Materialoj de Ĉina Moderna Epoko” en kunlaboro kun Ĝonghua-librejo. La unuaj volumoj de la biblioteko “Arkivoj pri la Politika Reformo en 1898”, “Arkivoj pri Tertremoj de King-dinastio” jam aperis, kaj baldaŭ sekvos “Arkivo pri la Boksista Movado” kaj “Arkivo pri Song Ging-ŝi”.

KANTO DE LA EDZINO

Lin Guang-hju—kamparano de Pandong-popolkomunumo en Guangdong-provinco

Iuvespere, mi kaj mia edzino forlasis la manĝejon de la popola komunumo kaj hejmeniris babilante. Apenaŭ ni atingis la hejmon, nin ĉirkaŭis subite la infanoj:

“Paĉjo, kantu kanton por ni!”

“Tion mi ne scipovas!” respondis mi kapskuante.

“Ne scipovas? Onjoj en la infanĝardeno ja diris, ke ĉiuj devas kanti. Kial vi ne?” Paŭtis la infanoj malbonhumore.

Momenton mi konfuziĝis ruĝiĝante kaj nesciante kiel respondi.

“Ne bruu! Ne bruu! Panjo kantos por vi.” diris subite mia edzino.

“Bonega la socialismo” eksonis la kanto kaj ĝi fluas kiel akvo de rivereto. Ĝus kiam ŝi finis la unuajn du versojn, tuj kunkantis ĥore la infanoj. Ho, kantemo de mia edzino denove vig-

liĝas, ja nur mallonge post la fondiĝo de la komunumo.

Ŝi estis vigla knabino kaj ŝatis ankaŭ zumadi kantetojn, kiam ni geedziĝis. En la kunvivado ŝi helpis al mi la sarkadon kaj akvumadon por la kampoj, kaj mi al ŝi la akvoportadon kaj porkbredadon. Ni ambaŭ estis gajaj. Sed de kiam naskiĝis la unua infano kaj ĝin sekvis la dua kaj la tria, ŝia kantemo iom post iom malaperis.

Verdire, ne ŝi estis kulpa. Laboris sur la kampo mi sola kaj same ŝi en la hejmo. Por ke mi povu iri al la kampo pli frue, ŝi devis leviĝi antaŭ la tagiĝo kaj finfari la matenajn laborojn: alporti akvon, pretigi matenmanĝon, nutri porkojn. Krome la tri infanoj ĉiam algluiĝis al ŝi: Tiu petis mamsuĉon kaj tiu ĉi banon; la malpli granda volis esti brakportata kaj dume ŝi timis, ke la granda falus en laĝeton; iu kriis por manĝaĵoj kaj la alia bruegis por ludo. . . ĉio ĉi tio okupis ŝin ĉiam konfuze.

Kiel diras la proverbo: “Por longa brako mallongas la maniko; kaj en malprofunda akvo kolizias la fiŝoj.” Estante ĉiam superokupata, ŝi do ne povis esti serena kaj ne plu estis tiel bonhumora kiel antaŭe.

Post la fondiĝo de la popola komunumo, stariĝis sinsekve ankaŭ la komuna manĝejo, infanvartejo kaj infanĝardeno. Ŝi ege ĝojas, ĉar ŝi ja ne plu bezonas sin okupi pri kuirado, nek pri la infanoj. Ĉiutage ŝi eliras labori kaj hejmeniras laŭ difinita tempo same kiel mi. Tiel do ŝi laboras kune kun aliaj virinoj de la produkta brigado kaj aktive partoprenas la kulturajn kaj amuzajn agadojn.

Ĝuste tia vivo agrabla kaj ĝoja alportis denove al mia edzino kantojn nefinkanteblajn.

Ĉio en Prospero Papertranĉaĵo de Song Joŭ-caj



KURSO DE ĈINA LINGVO

kvankam interesas iujn legantojn, fakte helpas malmulte al la lernado de la ĉina lingvo pro la longa 2-monata aperperiodo de nia revuo. Por ŝpari spacon al pli interesaj materialoj, ni decidis ne plu aperigi tiun ĉi kurson.

La Redakcio

La saŭcitaj bambuĝerموj de Tongguan

POST unuminuta halteto ĉe malgranda stacio, nia rekta vagonaro de Pukoŭ al Hi-an daŭrigis sian kuradon okcidenten. La vagonara disaŭdigistino anoncis: "La sekvonta stacio estas Tongguan."

"Oni diris, ke la saŭcitaj bambuĝerموj de Tongguan estas fama produktaĵo," al sia kunulino ekparolis la junulo, sidanta apud mi. "Mi ne sukcesis aĉeti ilin irvoje. Revene ni nepre iom aĉetu. Nu, ĉu vi ŝatas tian manĝaĵon?" Laŭ lia dialekto, li ŝajnis ŝanhajano. Evidente absorbite de la pejzaĝo ekstere, la Ŝanhaja knabino ĝis nun sin apoginte al la fenestro rigardadis eksteren. Nun ŝi respondis ne returnante sian kapon: "Ne, tion mi tute ne volas. Sed ĉar oni vin petis, vi devas iom aĉeti."

Ekde Luojang ni kunvojaĝis, nur nun ni komencis interbabili. Mi sciigis, ke nur antaŭ kelkaj tagoj la junulo hejmen iris de Karamai, la olea regiono de Hingiang-provinco, al Ŝanhajo, por edziĝi al tiu ĉi knabino, kiu nove gradiĝis el teknika mezlernejo kaj komencis labori antaŭ nelonge. Lia superulo donis al li forpermeson de unu monato, sed la novedzo petis nur du semajnojn, intencante reveni tuj post la geedziĝo kaj la pasigo de la Printempa Festo*. Sed la knabino estis eĉ pli rapidema ol li. Aŭdinte lian priparolon pri la nuna stato de la olea regiono, ŝi petis kaj ricevis permeson de sia supera aŭtoritatulo transigi ŝian laborpostenon al Karamai kaj decidis tie okazigi ilian geedziĝan solenon. "Estas egale, kie ajn vi geedziĝu," diris ŝia patrino. "Sed, ĉar via novedzo venis de tiel malproksima loko, almenaŭ lasu lin pasigi la jarfinon hejme. "Sed," argumentis la filino, "kiam ni estos geedziĝintaj tie, ĉu li ne egale, jam, pasigos la feston hejme?" Tiamaniere post tritaga restado en sia hejmo, la junulo revenis kun ŝi okcidenten. La malkaŝema junulo varme rakontis ĉion al mi. Returninte la kapon, la knabino ĵetis straban rigardon al li, kun ruĝiĝo sur la vizaĝo.

La maljunulo sidanta kontraŭ mi ekinteresiĝis en nia interparolado kaj intermetis: "Kie vi laboras, kamarado?"

"En Karamai"

"Ho, bona loko ĝi estas! Ĉu vi ekspluatas oleon? Kiel dankemaj ni devas esti al vi, ĉar niaj traktoroj, kotonmaŝinoj kaj muelejo de la popola

komunumo ĉiuj funkcias per la oleo produktita de vi. Ĉijare ni starigos multe pli da fabrikoj kaj instalos multe pli da maŝinoj. Petu por ni tieajn kamaradojn, ke ili produktu multe pli da oleo."

La junulo ripete kapjesis ridante. Kun ekscitiĝo, fiksante siajn pligrandigitajn akve brilajn okulojn al la aĝulo, la knabino demandis:

"Kie estas via hejmo, avo?"

"Mia hejmo? Baldaŭ mi atingos. Estas en Vejnan. Mi revenas nun de Hubej-provinco, kie mi vizitis mian plej aĝan filon, armeano en la Popola Liberiga Armeo."

"Revenas vi por pasigi la printempan feston?"

"Ne, por partopreni la amasigadon de sterko. Oni tion faras nun grandskale en Hubej-provinco. Sendube, en Vejnan oni entreprenas la samon. Mi pasigis nur kelkajn tagojn ĉe mia filo, kaj resti tie plu mi jam ne povis."

La vortoj de la maljunulo multe tuŝis nin. Senkonscie mi elrigardis tra la fenestro: Degelis jam la glacio en la Flava Rivero kaj ŝveliĝas la printempa akvo. Sur la kampoj iras tien kaj reen sterkoĉaroj kaj leviĝas ĉie fumo de sterkofumajigado. Venas printempo de pli granda impeto!

La disaŭdigistino anoncis: "La vagonaro baldaŭ alvenos al Tongguan-stacio."

"En Karamai estas ankaŭ vejnan-ano." La junulo denove ekpensis pri la saŭcitaj bambuĝerموj. "Estis li, kiu diris al mi: 'Ne malproksime de Vejnan situas Tongguan, kies loka produktaĵo —saŭcitaj bambuĝerموj tre bongustas.' Ĉu ili estas aĉeteblaj, avo?"

"Ĉar nun intensa estas la trafiko, mallonge haltas la vagonaro, tial oni ne povas eliri el la stacio kaj sur la perono verŝajne ili ne estas aĉeteblaj." Sed subite la maljunulo ekpensis ion kaj diris kun mangesto: "Nu, estu trankvilaj! Mi trovos rimedon."

Kiam la vagonaro haltis ĉe Tongguan, la maljunulo petis min prizorgi liajn aĵojn kaj elvagoniĝis la unua. Tuj poste lin sekvis ankaŭ la junulo.

La vagonaro estis formoviĝonta. Revenis la junulo kun malplenaj manoj. Sed la maljunulo en-

vagoniĝis kun ligajo el kvar pakajoj da saŭcitaj bambuĝermoj. Ni ĉiuj rigardis lin kun miro. Li ŝerce diris ridante: “Ĉu mi ne diris al vi, ke mi trovos rimedon? Ha, ha! Mia dua filo, kiu laboras en la stacio, skribis al mi, kiam mi estis en Hubej, ke li aĉetos por mi saŭcitajn bambuĝermojn kiam mi revenos. Jen, ĵus mi ricevis de li.”

“Prenu ilin, junulo. Du pakajoj estas por vi kaj la fraŭlino, kaj la aliaj du por via kolego, la vejnan-ano, kaj aliaj kamaradoj.” La maljunulo transdonis la ligajon al la junulo.

“Ho ne, avo! Retenu ilin por vi mem, venas ja la Printempa Festo!” Unuvoĉe rifuzis la gejunuloj la donacon.

“Nu, prenu, kiam oni pri tio vin petas. Ĉu mankus al ni tia ajo ĉi tie? En la komuna manĝejo de nia popola komunumo ne nur riĉe varias la manĝaĵoj, estas instalita ankaŭ bufedo por frandaĵoj.”

Ĝang Ŝi:

La Maljuna Ĉeflaboristo

ĈEFLAVORISTO Lej Hong-taj ĉe la konstruejo de la fervoja ponto de Dan-rivero jam aĝas sesdek jarojn ĉijare. Laŭ la Laborprotekta Regularo li rajtas ĝui sian emeritecon. Sed ĝis nun li ne prezentis la petskribon, do la fakestro sendis min interparoli kun li tiuteme.

Frumatene mi enaŭtiĝis en la ŝarĝaŭton, kiu transportos tien pumpilojn. La aŭto estis malgranda kaj la kvar pumpiloj jam plene ĝin plenigis, ke ne troviĝis loko por meti piedojn. Dank’ al kunvojaĝanta maljuna laboristo, kiu sternis sian vatitan palton sur la maŝinon, mi povis, profitante la okazon sidiĝi.

La vetero estas tre bela hodiaŭ. Estas la unua hela tago de post la komenciĝo de la pluva sezono en la regiono de Tajhang-montaro. Sur la ĉielo, grandaj blankaj nuboj ĉifonigite pelataj de l’ vento disŝvebas malrapide en malgrandaj pecoj, malkovrante la lazure lazuran ĉielon. La postpluvaj montoj blindige brilas sub la suno. Mi alparolis la maljunulon kunvojaĝantan: “Tre bela estas la vetero hodiaŭ!”

Ne estas rifuzebla la fervorega komplezemo, la gejunuloj povis fari nenion alian ol akcepti la pakajojn dankeme. Ili demandis la maljunulon pri la prezo. Ĉe tio la aĝulo ŝajnis ofendiĝon, longigante la vizaĝon: “Por kio? Se vi volas pagi, mi ne donos ilin al vi. Tio estas nia loka moro, kiun vi devas observi ĉi tie.”

La vagonaro fluge kuris sur la ebenajo de Vej-rivero kaj, preterpasinte Hua-monton, tre baldaŭ alvenis al Vejnan. La maljunulo tuj devagoniĝos. El sia valizo la junulo elprenis grandan pakajon, kiun li transdonis al la maljunulo, dirante: “Avo, gustumu la faman produktajon de Ŝanhajo—la spicitaj faboj de la urba templo. Frandu ilin ankaŭ viaj genepoj dum Printempa Festo.” La maljunulo skuetis la kapon, kaj akceptis la pakajon. Varme la gejunuloj adiaŭis akompanante lin ĝis la vagonpordo.

**Printempa Festo—tradicia novjara festo laŭ ĉina luna kalendaro.*

“Ne ĝoju tro frue,” li diris sonore, ekrigardante la ĉielon per duonfermitaj okuloj. “La ŝoseo estas eble ne facile irebla, tuj post la pluvo.”

Li estis kvindekkelkjara maljunulo kun vizaĝo multe spertinta la venton kaj prujnon, elstarantaj vangostoj, grizaj haroj sur la tempioj kaj kelkaj profundaj sulkoj sur la frunto. Li sin vestis per tute nova fervojista uniformo, kun la fervojista insigno kaj kelkaj medaloj sur la brusto. Sed la vatita palto estis terure malpura kaj plene olemakulita. Mi konjektis, ke eble li estas maŝinisto, ĵus revenanta de la hejmo post siaj ferioj. Malkaŝema kaj babilema, li estas tia homo, kiu tuj intimiĝas kun kiu ajn post interŝanĝo de kelkaj vortoj.

Antaŭen kuras la ŝarĝaŭto sur la ŝoseo laŭ Dan-rivero. La ĉiel-skrapantaj montoj etendiĝas ambaŭflanke laŭ la zigzaga ŝoseo kvazaŭ du longaj smeraldaj remparoj. La postsignoj de elfosado tie kaj ĉi tie jam pli malpli klare konturis la fervojlinion. De la malproksimaj montoj aŭdiĝas intermite tondrado de la rokeksplodaj minoj.

Rigardante ekscitite la vidaĵojn laŭlonge de la ŝoseo, la maljuna kamarado kunvojaĝanta diris al mi kun kortuŝiĝo: "La konstruejo transformiĝas ĉiutage. Post forlaso de nur unu monato mi jam povas rimarki la konturon de la fervojo." Li oblikvigis la kapon flanken, kvazaŭ pensante pri io interesa, kaj ekridis subite: "Feliĉe mi ne restis hejme dum la tutaj tri monatoj, alie la vagonaro estos jam kuranta sur la fervojo kiam mi revenos!"

"Vi, do revenas antaŭ ol viaj ferioj estas pasigitaj?" mi demandis.

"Tio estas ankaŭ unu formo de impeto!"

"Vi revenas ja ĝuste en la mezo de bolanta entuziasmo," mi diris. "La kuranta monato estas la impeta monato de nia konstruejo. La partikomitato elmetis novan celadon por impetado ke la fervojo funkciu ĝis la urbo Ĝinĉeng en marto venontjara."

"O," li kriis kun miro montrante du fingrojn, "je du jaroj pli frue? Brave! Vere mirinde! Ĝuste kiam mi estis hejme dum miaj ferioj, la Partia Centra Komitato publikigis la Ĝeneralan Linion de Socialisma Konstruado. El tagjurnaloj mi legis, ke ĉie tra la lando oni antaŭen saltas grandmezure. Sciante, ke ni ĉe la nova konstruata fervojo nepre ne postrestos, mi ne povis trankvile resti hejme plu kaj deziris tutkore reveni kiel eble plej frue. La familianoj klopodis reteni min per ĉiaj rimedoj, sed vane. Profitante iutage la okazon ke ili estis ĉiuj for en siaj laborejoj, mi rapidis al la stacidomo kaj revenis vagonare."

Mi ekridis pro liaj vortoj.

Rimarkinte ke mi tiel ridegis, li klarigis: "Eble vi ne komprenas, kamarado. Miaj filo kaj bofilino estas tre bonaj al mi. La patrino mortis antaŭ longe, sekve ili precipe simpatias al mi vidva maljunulo. Antaŭ du jaroj kiam mi laboris ĉe la Baŭgi-Ĉengdu-fervojo, ili jam ripete skribis al mi, por revenigi min hejmen. Por diri la veron, kelkiam mi ankaŭ sopiris al la parencoj kaj deziris reveni hejmen por karesi la nepeton kaj ĝui avan feliĉon por kelkaj tagoj. Sed, ĉar mi jam alkiutimiĝis al migrado ekstere kaj malmulte zorgas pri hejmaj aferoj, ĉiama okupateco fojfoje prokrastis mian revenon ĝis tiu ĉi fojo. Lastan monaton ili sendis al mi eĉ telegramon, kiun vidis mia estro kaj li donis al mi trimonatan "devigan" forpermeson. Tiamaniere mi revenis hejmen. Ha, la du infanoj miaj efektive pripensis pri ĉiuj detaloj, ili pretigis por mi apartan kvietan ĉambbron kaj havigis al mi multajn ĉiutagajn necesajojn i. a. radiaparaton, kompletan ilaron por fiŝhokado kaj krome monatan aŭtobusan bileton, per kiu mi povis veturi

per ĉiu ajn aŭtobuso tra la tuta urbo. Unuvorte, ili jam pretigis ĉion por ke mi povu bone manĝi, trinki kaj sin amuzi. El tio mi divenis, ke ili intencas aranĝi por mia emeritiĝo."

"Kiel feliĉa vi estas," mi intermetis, "ke vi havas tiel bonajn filon kaj bofilinon!"

"Feliĉa mi ja estas," ridante li diris. "Tamen ĉiu havas sian malsaman inklinon."

"Kian malsaman inklinon?" mi demandis kun intereso.

"De kiam mi komencis labori sur la fervojo en mia 18-a jaro, kiel kajto kun rompita tirdadeno, mi migras sude kaj norde, en vento kaj pluvo, jam dum plejparto de mia vivo. Sate resti senfare en la hejmo tuttage estas por mi efektive io neeltenebla! Ne malbone estis dum la unuaj tagoj post mia reveno al la hejmo, kiam ĉiutage mi okupiĝis pri nenio alia krom porti la nepeton en la brakoj, promeni en la parkoj, hoki fiŝojn, viziti teatrojn pasigante la tempon sufiĉe agrable. Sed, mi ne scias kial, ju pli longe mi restis hejme, des pli forte mi enuiĝis. Ne nur la nenifarado estis netolerebla al la tutkorpaj muskoloj kaj ostoj, sed la malpleneco en la koro sentigis senapogon. Post malpli ol unu monato, mi jam ne povis plu elporti la enuon, pripensante nur la konstruejon tage kaj nokte. Miaj infanoj estis ja bonaj al mi. Ĉe ekparolo pri foriro, ili klopodis malkonsili min ĉiamaniere. Ankaŭ mi ne ŝatis rekte spiti ilian volon. Trovante neniun pli bonan elirejon, mi povis nur entrepreni 'dezerton.'" Li mem ankaŭ nereteneble eksplodis per ridego.

Dum mia ridado mi pensis, kia hazardo estas ke li estas ankaŭ maljunulo, kiu verŝajne baldaŭ atingos emeritan aĝon, kvankam li aspektas malpli ol sesdekjara.

Tial mi demandis: "Kiom aĝa vi estas?"

"Nu, kiom laŭ via konjekto?"

"Kvindek kelkajn jarojn?"

"Proksimume," li diris kun rido, iom kontente karesante per sia mano, la blankan barbastumpon sub la mentono.

"Kiom precize?" mi demandis denove.



Ĉesinte ridi, li diris serioze: “Ne gravas la aĝo, sole gravas la volo! La proverbo diras: ‘Maljuna laŭ aĝo, sed juna en koro.’ La Malsaĝa Avo* eĉ komencis translokigi montojn, kiam li havis pli ol 80 jarojn, ĉu ne vere?”

Dum nia babilado, la ŝarĝaŭto jam nerimarkite veturis el la valo kaj atingis la supron de alta monto. Antaŭ niaj okuloj subite prezentiĝis vasta panoramo: la ondantaj montoj, la arĝente brilanta Dan-

rivero, la blankaj tendoj kaj verdaj arbaroj dissemi-
mitaj sur la montodeklivoj kaj apud la riverbordo-
j, ĉiuj fokusiĝis en niaj okuloj.

Elspirante longan spiron, li diris ŝerce: “Ha, jen estas loko por mia emeritiĝo!” Mi perceptis en lia voĉo profundan emocion.

Transpasinte la montdorson, la aŭto komencis kuri malsupren sur la deklivo en la direkto al la

Nikolao Tihonov

Ponto trans Jangzi

*Kiu ĝin vidis—firman, metalan,
Ligantan Sudon kun Nord’,
Altleviĝantan koloson ŝtalan
Super la akvo kaj bord’,
Kie la verda ĉiel’ ĉirkaŭvestas
La kronplektaĵojn el fer’, —
Tiu komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*

*Kiu tranagiis tiun ĉi vaston
En la malvarm’ kaj obskur’,
Sole celante sturmon finlastan,
Sangon verŝante nur
Por la triumfo, kiu nun restas
La tutpopola fier’ —
Tiu komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*


*Kiu navigis dum tempo kutima
En vagonaro sur pram’
Kaj krom la brilo de akvo senlima
Vidis nenion jam,
Sole kredinte—post ondoj majestaj
Fine vidiĝos la ter’, —
Tiu komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*

*Kiu betonan kaj ŝtalan monton
Altigas, tunon post tun’,
Kaj per la peno sendorma estonton
Faras kaj gajnas nun,
Dum la ondegoj brue protestas,
Kvazaŭ batas kuvojn el fer’, —
Tiu komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*

*Kiu nun vidas: koloso tia
Super “ĉiela kav’”
Pri amikeco Ĉini-Sovetia
Diras per lingvo de rav’
Kaj pli ol ajna parolo atestas
Interfratiĝon en ver’ —
Tiu komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*

*Pasis senfinaj jarmilaj ordoj,
Kaj ĉiuj miriĝus, se
Iu ekrevus pri pont’ inter bordoj
De potenculo Jangzi.
Kaj plenumiĝon de l’ revoj nun festas
Nova Ĉini’ en fier’.
Ĉiuj komprenas, kio ĝi estas:
Pont’ trans Jangzi-river’!*

Esperantigis el la rusa K. Gusev



valo. Ĝi glitis malsupren tiel facilmove, kvazaŭ ĝi estus fluganta for de la tera surfaco.

Longan momenton ni ambaŭ silentis sen parolo. Mi meditis pri la alia baldaŭ renkontota maljunulo —tiu sesdekjara ĉeflaboristo. Pasis jam pli ol duonjaro, sed li ankoraŭ ne prezentis petskribon pri emeritiĝo. Ĉu li ankaŭ havas la saman inklinon kiel tiu ĉi antaŭ mi? En mia laboro mi havis multe da spertoj interrilati kun aĝuloj, sed el la interparolado kun tiu ĉi maljuna kunvojaĝanto, mi sentis ion novan kaj emocian.

Kiam mi estis rekomenconta kun li pri io babili, la aŭto subite ekhaltis ĉe la vojrandoj kun ekskuo.

“Kio okazis?” ni samtempe stariĝis, kaj ambaŭ konfuziĝis vidinte ke sub la deklivo antaŭ ni la ŝoseo jam estas subakvigita de torenta rivero kaj fariĝis vasta maro de inundo.

La ŝoforo elpaŝis el la veturigistejo, kuris al la riverbordo kaj gape ekzamenis la situacion dum momento kaj diris depremite: “Kia domaĝo! Ne eblas transpasi!”

Ni ambaŭ elaŭtiĝis, kaj ankaŭ iris al la riverbordo.

La kota riverakvo fluegis antaŭen ŝaŭme ondante. La distanco inter ambaŭ bordoj estis ĉirkaŭ 20 metroj, kiun la aŭto verŝajne ne povis transpasi. Sed la maljuna kamarado sin turnis al la ŝoforo kaj diris: “Kamarado ŝoforo, la aŭto povas transpasi la fluon!”

La ŝoforo ĵetis al li duban rigardon kaj silentis.

“Tio estas ebla,” li insistis.

“Ŝajnas ne,” mi diris.

“Certe eblas la transpaso. La topografion ĉitiean mi bone konas. Mi prirespondos!”

“Vi ne prirespondos, kiam la aŭto renversiĝos!” La ŝoforo estis sufiĉe juna sed parolis sufiĉe sarkasme.

Lia rimarko videble kolerigis la maljunulon, kiu kriegis: “Mi persone konstruis ĉi tiun parton de la ŝoseo. Eĉ kun fermitaj okuoj mi povas laŭiri ĝin, sciante, kie ĝi estas alta kaj kie malalta. Mi vados en la torento por vin gvidi.”

“Neeble!”

“Nu, vidu!” Kun la vorto li tuj demetis siajn ŝuojn kaj ŝtrumpojn kaj refaldis la pantalonkrurojn.

“Kion vi volas, maljuna kamarado?” Surprizite mi klopodis deteni lin.

“Lin konvinki!” Li forpuŝis min kaj paŝis en la riveron nudpiede, tenante la ŝuojn kaj ŝtrumpojn en la manoj.

Surprizita estis ankaŭ la ŝoforo kaj staris gapante.

Mi Volus Fariĝi Amema Birdeto

— Popolkanto de Gianghi-provinco —
Ilustris Mi Gu

*Saltadas harligoj kaj ruĝas vangetoj—
ŝi paŝas ventfluge kun ŝarĝo cent-ĝina*.
Mi volus fariĝi amema birdeto,
por flugi kun vent' al la dom' amatina.*

Elĉinigis Laŭlum

* Ĝin-o = ½ kg.




La maljunulo vadis en la riveron, balancante ambaŭ brakojn, kaj ŝanceliĝante li iris paŝon post paŝo al la profundejo. La rapidega akvofluo sin ĵetis kontraŭ liaj kruroj, estigante ĉirkaŭ li blankajn ŝaŭmantajn ondojn. Sed li paŝis laŭ ĝusta linio. Kvankam la torento furiozis laŭ aspekto, tamen plej profunde ĝi atingis nur liajn genuojn.

Post nelonge li surbordiĝis ĉe la kontraŭa flanko.

“Kiel vi opinias, kamarado ŝoforo?” li kriis al al ni de la alia flanko. “La konstruejo urĝe bezonas pumpilojn. Nun estas via vico!”

“Rapide enaŭtiĝu!” kriis al mi la ŝoforo, kiu, mi ne scias kiam, jam sidiĝis en la veturigistejo. Rapideme mi surgrimpis la aŭton. Muĝante kiel kolera tigo, la ŝarĝaŭto kuregis per tuta forto en la ondantan torenton.

La aŭto suriris sur la kontraŭan bordon kaj la estiminda maljuna kamarado enaŭtiĝis. Lia freŝnova blua uniformo estis plenmakulita de ŝlimo. Mi helpis lin demeti kaj premordi la malsekan veston kaj surmetis sur lin anstataŭe la vatitan palton.



Ponto sur Siĉuan-Gujĝou-a Fervojo ĉe la urbo Gujjang en konstruado

Lignogravuris Vang Ŝu-ji

“Fulmotondro!” Ĵus aŭtuniĝis, kaj la akvo estas jam tiel malvarma kiel glacio.” Li diris kun siblo. Liaj lipoj fariĝis blujaj de malvarmo. Li tremadis tutkorpe kaj forte sin frotadis per viŝtuko. Kiam li forprenis sian larĝrandan ĉapelon, mi rimarkis kun miro, ke lia verto estas jam brile kalva, kaj restas nur ringo da arĝentaj haroj ĉe la oreloj.

“Via verto. . . .” mi ekdiris ne reteneble, sed tuj mi englutis la reston.

Mia vorto ege lin tuŝis. Karesante sian brilantan verton, li diris: “Ve, efektive mi maljuniĝis! La jaroj ne scias indulgi! Se mi estus kelkajn jarojn pli juna, mi ne tremetus eĉ en glacia truo.”

“Vi estas ja sufiĉe fortika laŭ via aĝo,” mi diris.

“Jes, inter la maljunuloj ĉe la ponto de Danrivero, mi ja kalkuliĝas kiel la plej korpo-fortika.”

Ekpensante pri la vizitota maljuna ĉeflaboristo, mi demandis: “Kia estas la sano kaj korpofortikeco de maljuna** Lej?”

“Ĉu vi konas lin?” li demandis kun levitaj brovoj.

“Ne, sed mi iras lin viziti.”

“Por kio?”

“Lia aĝo jam atingis sesdek, tial mi iras paroli kun li pri lia emeritiĝo. Eble li estas via ĉeflaboristo, ĉu ne?”

“Jes, li estas,” li respondis interese, kun duonfermitaj okuloj. “Sed laŭ mia scio, la maljunulo verŝajne ankoraŭ ne volas emeritiĝi.”

“Kial ne? Emeritiĝo ja estas sistemo je bono de la laboristoj, fiksita de la ŝtato! Pasigi la vesperon de la vivo trankvile, ricevante pension de 60% de la salajro ja estas bono absolute neimagebla en la malnova socio!”

“Bono efektive ĝi estas, tamen sin trovas homo, kiu ankoraŭ ne volas ĝui tiun bonon.”

“Pro kio, do?” mi demandis kun miro.

“Tion mi ne povas klarigi en kelkaj vortoj.

Kiel ajn estu la afero, la majunuloj, finfine, ne tiel sopiregas al ripozo hodiaŭ, kiel antaŭe!”

“Ĉu vi volas diri, ke pro financa konsidero pri sia ekonomia stato, maljuna Lej ankoraŭ ne volas tuj emeritiĝi kaj ricevi nur 60% de sia salajro?”

“Salajro?” Ĵetinte al mi rigardon kun larĝe malfermitaj okuloj, li ripetis la vorton en tirata voĉo. Post momento li diris en instrudona tono karakteriza al aĝuloj: “Mia juna fraĉjo, vi ne konas la koron de nunaj maljunuloj!” Tion dirinte li sin turnis, direktante la rigardon malproksimen, verŝajne ne volante plu tuŝi la temon.

El lia vizaĝo, mi legis ian malbonhumuron, kies kialon mi ne sciis.

Poste, mi provis ŝanĝi la paroltemon, por babili kun li pri io alia, sed li nur hahahaheis, donante neniun kompletan frazon dum longa tempo. Troviĝante en embaraso, mi ne povis plu daŭrigi la parolon.

Post la kvara horo posttagmeze, la ŝarĝaŭto alvenis al la konstru-tereno de la ponto de Danrivero. Tuj kiam ĝi haltis ĉe la ponto, la maljunulo kapsignis al mi kaj foriris per si mem. Mi ankaŭ elaŭtiĝis, kaj iris trans la ponton al la oficejo de la labor-distrikto sur la monto. Kiam mi trovis la estron de la labordistrikto, mi multe malesperis, ĉar li informis al mi ke, jam de longe ĉeflaboristo

Lej Hong-taj estis foririnta por siaj ferioj kaj ĝis nun li ankoraŭ ne revenis.

“Kial vi ne unue telefonis al ni?” diris la estro en simpatio.

“Jen, ĝuste tion mi forgesis, alie mi ne venus vane,” mi diris memkonsole.

Post vespermanĝo mi penis telefone kontakti kun mia fako, sed ne sukcesis, ĉar la telefona linio estis ĉiam okupata de la avizoj kaj instrukcioj pri la superakvo kaj la vetero. Nur post la naŭa mi povis paroli telefone kun la fakestro, kiu ordonis ke mi revenu morgaŭ matene.

La longa veturado en la ŝarĝaŭto tiom lacigis min, ke tuj post la telefonado mi senprokraste enlitiĝis, por reiri frumatene la sekvontan tagon. Mallongan tempon mi estis kuŝiĝinta, kiam entrudis en la ĉambron la distrikta estro, kiu diris ridante: “Kia hazardo! Maljuna Lej jam revenis! Ĝus ĉe la pontkolono No. 3 mi vidis lin. La maljunulo rekte iris al la laborejo tuj post la reveno.”

“Kiam li revenis?” mi demandis.

“Hodiaŭ. Li revenis per la aŭto, kiu transportis pumpilojn.”

“Kio? . . . Kie li nun estas?” Mi saltis el la lito, surmetis la veston kaj rapidis al la laborejo.

La konstruejo estas prilumata de sennombraj brilaj lampoj tiel brile, kvazaŭ en la tago. La brilaj lampoj, la kurantaj homamasoj kaj la rebrilantaj ondoj, ĉio interbrilis antaŭ la okuloj. La zumado de maŝinoj, la signalfajfado kaj la plaŭdado de ondoj interplektiĝas en potencon seninterrompan sonfiuon

vibrigantan la tutan valon. Mi malsupreniris laŭ la deklivo, trapasis la fersnuritan pendponton super la akvo, kaj blinde traserĉis ĉie inter la densa skafaldo kaj svarmantaj homoj. Finfine mi trovis

la pontkolonon n-ro 3. Multaj laboristoj streĉe laboras sube. Tuj mi vidis la homon kun larĝgranda ĉapelo, kiu estas neniu alia ol tiu, kun kiu mi kunveturis.

Hazarde li sin turnis kaj ankaŭ vidis min. “Hej, finfine vi trovas min!” li diris ŝerce. “Ĉu ni ne interparolis jam pri la afero?”

Mi venis en hasto, mi ne trovis tuj vorton por respondi. Nur la koro varmas al mi, jen kaj jen.

“Mia juna fraĉjo,” li daŭrigis, “ne koleru, ke mi maljunulo parolis maldelikate. Vi ne konas la koron de nuntempaj maljunuloj!” Li metis sian grandan, krudan manplaton sur mian ŝultron kaj diris montrante al la maro de trembrilantaj lampoj sur la konstruejo: “Rigardu. Jen estas la kialo, ke mi ne volas emeritiĝi! Nur ĉi tie mi vivas signifoplene, sentas min juna kaj laboras kontente. Mi volas ankoraŭ labori almenaŭ dek jarojn por socialismo!”

* *Malsaĝa Avo: Legu “Translokigo de montoj” p. 94 de la jarkolekto 1958 de nia gazeto.*

** *Maljuna: epiteto por esprimi intimecon.*



Longa Pentraĵo sur Rulvolvajo

La skizo de “Nia Ĉefurbo Pekino” longa pentraĵo, kolektive kreata de ĉinaj pentristoj Gu Ji-ĝou, Huj Hiaŭ-tong k. a. estas jam ellaborita. La pentraĵo estas cent kelkdek futojn longa horizontale kaj pli ol du futojn alta, kaj pro ĝia longo eksterordinara, oni ĝin nomas “Romano” de ĉin-stila pentrarto. Tiu ĉi verko prezentas la panoramon de la nova Pekino kun ĝiaj belaj palacoj, kolosaj fabrikoj, vasta akvokonservejo, trafikovigla Granda Kanalo, fervojoj, ŝoseoj kaj famaj vidindaĵoj. Ĝi estas duoble pli longa ol la fama pentr-rulvolvajo “Al la Rivero je Kingming-festo (t. e. la 5-a aŭ 6-a de

aprilo)” de Ĝang Ze-duan en Song-dinastio (960-1279 p.K.).

Ĉinaj Sciencistoj Honoritaj de la Scienca Akademio de USSR

La 1-an de junio, A. N. Nesmejanov, la estro de la delegacio de la Scienca Akademio de USSR, kaj prezidanto de la nomita akademio, donis en Pekino la diplomojn por eksterlandaj akademianoj al Guo Mo-jo kaj Li Si-guang, prezidanto kaj vicprezidanto de la Scienca Akademio de Ĉinio respektive. Ilin la Scienca Akademio de USSR elektis, en sia plena kunsido, membroj de la akademio. Okaze de la donado de la diplomoj, A. N. Nesmejanov

ankaŭ donacis pli ol mil sciencajn verkojn kaj semojn de multaj plantoj al la Scienca Akademio de Ĉinio.

Ankaŭ Gansu-provinco Produktas Ursokaton

En marto, ĉasistoj en Ven-gubernio de Gansu-provinco kaptis malgrandan ursokaton (Ailuropus melanoleucus, mambesto simila al malgranda urso) en profunda montaro. La besteto estis nur 3-monata, pezis 7.5 kg. kun blanka hararo sur la tuta korpo, escepte de la partoj ĉirkaŭ la okuloj, la kolo, la oreloj kaj la postajo, kie ĝiaj haroj estas nigraj. Tio pruvas, ke la rara besto vivas ne nur en Siĉuan-provinco, kiel oni opiniis antaŭe.

Rakonto pri la eniro en Tibeton de princino Ven-ĉeng



**Statuoj de Sunzankampo (maldekstre) kaj princino
Ven-ĉeng en Culakang-templo**

*Je la dekkvina de l' monat' unua,
Princino Ven-ĉeng venas en Tibeton.
Ne timu iri tra l' vasta stepo, —
Vin bonvenigas cent ĉevaloj fortaj!
Ne timu grimpi trans la neĝajn montojn altajn,—
Vin bonvenigas cent obeaj jakoj*!
Ne timu pasi trans profundaj riverfluoj,—
Vin bonvenigas cent boatoj ĉeval-kapaj!
Ĉi tie estas bela lando
Nomata Pekungjung.
Kaj kiel multajn grenajn semojn alportis princino
Ven-ĉeng!*

Entute tri mil okcent specojn!

La supre citita estas la plej ŝatata popolkanto de la Tibeta popolo—la “Emalaja”. Kiom da tibetaj kantoj kaj legendoj ja kantas kaj rakontas pri princino Ven-ĉeng!

Svato en Ĉang-an

Kiam la Tibeta princo Sunzankampo (en lia tempo oni nomis lin Reĝo de Tufanoj) estis 16-jara, li aŭdis, ke la imperiestro de Tang-dinastio havas principon nomatan Ven-ĉeng, kiu estas ne nur tre bela sed ankaŭ eksterordinare talenta, kaj ne nur bone konas la klasikajn poemojn kaj verkojn sed ankaŭ lertas en diversaj metioj. Sen-nombraj kaj sen-nombraj svatantoj venis el diversaj

*Jako: Tibeta bovo.

regionoj al la ĉefurbo Ĉang-an por peti la manon de la princino. La imperiestro Taj-zong volis elekti por ŝi saĝan kaj kapablan edzon. La Tibeta princo Sunzankampo, genia kaj brava, havis ĉirkaŭ si multajn konsilantojn spertajn en administraj kaj militaj aferoj, inter kiuj troviĝis, ekzemple, konsilanto Garba. Sunzankampo do sendis lin kaj cent kavalerianojn al Ĉang-an, tiam ĉefurbo de Tang-dinastio, kun multe da valorajoj (inter ili gemoinkrustita kiraso) kiel fianĉ-donacoj por fari svaton.

Garba kun la rajdistoj transiris montojn kaj riverojn, kaj fine atingis la ĉefurbon.

Samtempe venis ankaŭ kvar senditoj el aliaj regionoj kun la sama celo. La imperiestro alvokis ilin ĉiujn al si kaj diris: “Nun alvenis kvin svato-senditoj. Por ke nenia disputo estiĝu, mi ordonas, ke vi konkuru unu kun la aliaj je saĝeco. La princino edziniĝos al la mastro de tiu, kiu sin pruvos la plej saĝa. Ĉiu el la kvin senditoj kredis sin la plej saĝa kaj unuvoĉe konsentis. Tiamaniere komenciĝis la interesa kaj intensa konkuro.

Kvin Provoj al la Senditoj

La unuan fojon, la imperiestro prezentis al ili unu perlon tiel grandan kiel taso kun zigzaga traruo, kaj ordonis ilin traigi silkan fadenon tra la ruo. La senditoj el la aliaj regionoj multe klopodis, sed ĉiuj malsukcesis. Finfine Garba prenis grandan formikon, alligis al ĝia talio silkan fadeneton, metis ĝin en la ruon kaj buŝe blovis ĝin trifoje. Nun la formiko trairis la ruon kaj la silka fadeno estis ankaŭ trapasigita.

La duan fojon, la imperiestro ordonis la ĉevalistojn grupigi antaŭ la senditoj cent ĉevalinojn kaj cent ĉevalidojn, ke ili distingu la parencecon inter la patrin-ĉevaloj kaj siaj respektivaj idoj. La aliaj senditoj penis atingi la celon aŭ studante la koloron de iliaj haroj aŭ detale esplorante iliajn karakterizajojn, sed vane. Dume Garba ŝtele iris al la ĉevalistoj ŝajne por babiladi kun ili, sed fakte petis ilian instruon. La

ĉevalistoj aŭdis pri la saĝeco kaj eleganteco de reĝo Sunzankampo jam antaŭ longe. Vidante la sin- cerecon kaj modestecon de Garba per siaj propraj okuloj, ili kaŝe donis al li taŭgan konsilon. Post tio Garba postulis ke la ĉevalidoj estu enfermitaj en la stalo, ke ili ricevu nur fojnon sed ne akvon. La sekvintan tagon la ĉevalidoj estis liberigitaj kaj senditaj al la ĉevalinoj. Ili estis tiel soifaj post tiel longdaŭra manko de akvo ke ili rapidis al siaj respektivaj patrinoj por mamsuĉi, kaj Garba facile elmontris ilian parencecon.

La trian fojon, la imperiestro donis al ĉiu el la kvin senditoj po cent kruĉegojn plenajn de vino kaj cent ŝafojn. La tasko por ili estis eldrinki la vinon, formanĝi la ŝafviandon kaj fini la tanadon de la ŝaffeloj en unu sola tago. La senditoj el la aliaj kvar regionoj kun siaj sekvantoj tiel urĝe buĉis la ŝafojn, ke la grundo estis ĉie malpurigita per sango kaj haroj. Ili drinkis kiel funelo la vinon kaj antaŭ ol la ŝafaĵo estis formanĝita, ili fariĝis terure ebriaj, ke ili forgesis pri la tanado de la feloj. Nur Garba kun memfido ordonis siajn cent kavalirojn stari en vico. Ili buĉis la ŝafojn, trinkis la vinon en etaj tiroj, manĝis la viandon en etaj pecoj kaj samtempe tanis la felojn. Tiel, en unu tago la vino estis eltrinkita, la ŝafaĵo—formŝanĝita kaj la feloj—fintanitaj. Liaj homoj restis neebriaj kaj la grundo—tute pura.

La kvara provo havis lokon dum iu nokto. Subite la tamburegoj en la imperia palaco ektondris, la imperiestro ordonis ke la kvin senditoj tuj venu en la palacon por diskuti gravan aferon. Kiel novveninto en la ĉefurbo, Garba ne bone konis la vojon tial li faris signojn en ĉiuj necesaj lokoj por ne vojerari. Kiam la kvin senditoj atingis la palacon, la imperiestro ordonis ilin returnen-iri tuj al siaj respektivaj loĝejoj, ĉar li deziris scii kiu el ili atingos sian loĝejon la unua. Garba rapide revenis al sia loĝejo kun la helpo de la signoj antaŭe faritaj. Sed la aliaj kvar senditoj, kiuj venis al la palaco en konfuziteco ne atentinte la vojon, nun klopodante atingi sian loĝejon kiel eble plej frue, vojeraris en la abirinto de la palaco.

Ĉiujn provojn Garba trapasis sukcese, kaj la aliaj kvar senditoj rekoninte lian saĝecon kaj supercon, konsentis ke li akompanu la principon en Tibeton. Sed la imperiestro volis provi ilin ankoraŭ-foje. Li ordonis principon Ven-ĉeng kaj 2500 aliaj korteganinoj sin vesti en tute samaj vestoj, surporti tute samajn ornamajojn kaj grupiĝi kuŝe kaj


ordonis, ke kiu sukcesos identigi la principon, tiu rajtos ŝin forakompani. Ĉiu el la 2500 junulinoj estis pompe vestita, kunportanta tintantajn ornamajojn kun vizaĝo kvazaŭ plena luno kaj mieno dignoplena. Antaŭ tiuj junulinoj ne nur la senditoj de la aliaj kvar regionoj perdis memfidon, ankaŭ la sagaca Garba konfuziĝis. Sed li pensis en si: la sukceso estas preskaŭ en la mano, kiel do mi povus lasi la antaŭe faritajn klopodojn fariĝi vanaj en la fino. Sed neniam antaŭe vidinte la principon nek aŭdinte ian ajn karakterizan trajton pri ŝi, kion li povis fari nun?

Subite li memoris ke la mastrino de la gastejo foje diris al li, ke ŝi iam priservis la principon. Estis bone konsulti ŝin pri la trajtoj de la principo. Pro la juneco kaj braveco de la Tibeta reĝo kaj la afableco de Garba, la mastrino delonge aprobis tiun ĉi svatiĝon, do ŝi detale priskribis al Garba la trajtojn de la principo. Kiam Garba revenis al la kortego, li trovis ke la aliaj kvar senditoj jam finis la identigadon, sed feliĉe neniu el la identigitoj pruviĝis la principo. Garba trankviliĝis kaj iris al la junulinoj por observi ilin laŭvice. Kiam li atingis la sepan junulinon, li trovis ke ŝia vizaĝo estas blanka kun ruĝa nuanco. Garba observis ŝin de dekstre kaj maldekstre kaj trovis ke ŝiaj trajtoj ĝuste koincidas kun tiuj kiujn la mastrino priskribis, kaj li sukcesis identigi la principon.

La Eniro en Tibeton de la Principo

La imperiestro estis impresita per la saĝeco de Garba kaj konvinkita, ke la Tibeta reĝo nepre estas tre saĝa. Havi tian bofilon ja estis por li granda ĝojo. Riĉa doto estis preparita, kiun konsistigis, ekzemple, mebloj kaj vazoj, medikamentoj, klasikaj literaturaj kaj historiaj verkoj kaj libroj traktantaj diversajn produktajn teknikojn, muzikaj instrumentoj, ovoj de silkraŭpo, statuo de

Kelkaj el la muzikiloj kiujn principo Ven-ĉeng kunportis en Tibeton





Tibetanoj ŝatas ludi tibetstilan dramon pri la eniro en Tibeton de princino Ven-ĉeng

Sakamunio k.a. Ankaŭ multaj metiistoj diversspecaj kaj muzikista bando estis ekspeditaj al Tibeto kiel akompanantoj de princino Ven-ĉeng.

Kiam princino Ven-ĉeng atingis Lhasa-on, ŝi edziniĝis al Sunzankampo je pompa ceremonio. Kaj ekde tiu tempo la geedzoj vivis en reciproka amo kaj regis Tibeton kune kaj unuanime. La metiis-

toj kiuj akompanis la princinon, sukcesis en nelonga tempo, disvastigi inter la tibetanoj la scion pri agrikulturo, ŝpinado, arkitekturo, paperfarado, preparado de ĉina inko, vinfarado, argilaj-farado, metalurgio, farado de agrikulturaj instrumentoj, muelado ktp. Ankaŭ la Tibeta reĝo Sunzankampo kaj multaj aliaj tibetanoj, ŝanĝis siajn vestojn anstataŭigante tiujn el felto per tiuj el silkajo.

Post nelonge, laŭ la deziro de princino Ven-ĉeng reĝo Sunzankampo konstruigis Culakang-templon en la centro de Lhasa. Lagoj estis plenigitaj kaj ebenigitaj, montoj estis translokigitaj, brikoj kaj tegoloj estis bakitaj por la konstruado de Culakang-templo. Iutage princino Ven-ĉeng ĉeestis en la konstruejo por inspekti la laboron. La laborantoj rigardis la princinon tiel entuziasme, ke iu laboristo skulptanta la unuan ŝton-leonon, en stato de ekstazo senintence fortranĉis ĝian nazon. Poste, por akiri unuformecon, la nazoj de ĉiuj leonoj estis fortranĉitaj, tial oni nun vidas en Culakang-templo nur tiajn sennazajn ŝton-leonojn.

Favoroj Postlasitaj por Mil Jaroj

Je finkonstruiĝo de Culakang-templo princino Ven-ĉeng starigis en ĝi la statuon de Sakamunio

Paĝo el ĉina historio:

Kampana milito fine de Kin-dinastio

Peza servuto kaj rigora leĝaro Kvankam la Komenca Imperiestro de Kin unuigis la landon de Ĉinio, kaj fondis la unuan centralizisman imperion feŭdisman en la historio de Ĉinio, tamen liaj kruelaj ekspluatado kaj subpremado al la popolo forte ĝin indignigis. Li devis kampanojn konstrui al li la Grandan Muron kaj milojn da kilometroj da galopvojoj (landvojoj). 300,000 militistoj ekspeditaj en militon kontraŭ la hiongu-oj (nordaj nomadoj), estis ordonitaj restadi garnizone ĉe la landlimo. Aliaj 500,000 homoj estis senditaj al senfina batalado kontraŭ la jue-oj en sudo.

Li ankaŭ konstruigis luksegan palacon nomatan Afang, ĉe la suda bordo de Vej-rivero

proksime de sia ĉefurbo Hianjang (en nuna Ŝenhi-provinco). La fronta salonego de la palaco longis ĉ. 830 m., largis ĉ. 138 m., en la supra etaĝo povas sidi samtempe dek mil homoj, kaj en la malsupra oni povas starigi 17 m. altan flagstangon. Laŭ projekto, fronte de la palaco devis konstruiĝi ŝoseo kondukanta al la plej alta supro de la Suda Monto, kie lokiĝu la palaca pordego. Malantaŭe devis konstruiĝi alia ŝoseo kondukanta al Hianjang trans la riveron Vej.

Li konstruigis por si ankaŭ tre grandiozan maŭzoleon ĉe piedo de Li-monto, oriente de la ĉefurbo. La maŭzoleo estis pli ol 160 metrojn alta, kaj ĝia cirkonferenco longis je 5 lioj (2.5 km). Sur ĝia plafono engravuriĝis la stelaroj de la ĉielo

kiun ŝi kunportis kun si en Tibeton. Ŝi ofte faris paroladojn antaŭ la pordego de la templo al la tibetanoj pri la vivmanieroj kaj spertoj de produktado de la popolo vivanta en la interna parto de la patrolando. Ĉar princino Ven-ĉeng estis fervora budaistino, reĝo Sunzankampo baldaŭ estis konvertita al tiu kredo kaj entuziasme disvastigis la Budaisman religion inter la tibetanoj. Ekde tiu tempo Budaismo floradis en Tibeto. Jaro pasis post jaro, monato post monato, kiom da Tibetaj fratoj jam pie pilgrimis al Culakang-templo por kulti la statuon de Sakamunio kaj samtempe admiri la Princinan Salikarbon antaŭ la pordego de la templo, kiun la princino propramane plantis.

Princino Ven-ĉeng estis konvinkita ke sen skriblingvo estas malfacile konduki amasan edukadon, tial ŝi proponis al Sunzankampo krei skribosignojn. Reĝo Sunzankampo akceptis tiun proponon kaj kreis la Tibetanan alfabeton.

Plue, princino Veng-ĉeng helpis Sunzankampo fari leĝojn por puni la malbonajn kaj protekti la bonajn; enkonduki la ĉinan sistemon de jarnomigo; enkodigi regulojn kontraŭ la dek punindaĵoj: murdo, ŝtelado, adultado, trompado, malpacigo, dissemo de falsaj famoj, enviemo, malica intenco kaj perfido. Ili publikigis la "Dek Ses Esencaĵojn", kiuj honoras la bonojn, kiel ekzemple, honesteco en diro kaj agado, amo inter parencoj, helpo al najbaroj ktp.

Ekde tiu tempo la princino fariĝis sango kaj karno de la Tibeta popolo kaj la frateca rilato de la Han-a kaj Tibeta popoloj ankaŭ fariĝis pli intima.

kaj sur ĝia planko oni faris, per hidrargo kiel akvo, modelojn de la riveroj kaj maroj.

En la konstruado laboris pli ol 700,000 punitoj kaj la homoj transportantaj konstruajn materialojn el diversaj lokoj nombris ankoraŭ pli multe.

Kin havis leĝojn treege rigorajn kaj oni ofte estis peze punata nur pro krimo ne grava. Unu homo krimis, punon ricevis la tuta familio. Tiutempe, la popolanoj estis deklaritaj kulpaj tre facile, kaj en la vojo al Hianjang svarmis eskortataj krimuloj.

Tia tiraneco kaŭzis al la popolo grandegan mizeron, kaj vekis ĉe ĝi fortan indignon.

Ribelo de Daze-vilaĝo Post la morto de la Komenca Imperiestro, lia filo Imperiestro Dua, daŭre rekrutigis kamparanojn por garnizoni ĉe la landlimo. En 209 a. K. trupo el 900 kamparanoj survoje al Jujang (nuna Mijun, nordoriente de Pekino) haltis en vilaĝo Daze de Ki-gubernio (Anhuĵ-provinco). Kaŭze de pluvego,

ili jam perdis la eblon atingi la celokon je la limdato. Laŭ la tiama leĝo, la puno por tio estis morto. Ili estis kaj maltrankvilaj kaj indignaj. Iu el la trupo, nomata Ĉen Ŝeng devenanta de malriĉa kamparana familio, kaj alia trupano Vu Guang, ambaŭ tre amataj de la amaso, gvidis ĉiujn, mortigi la komandanton, kaj ekribelis en la vilaĝo. Ili prenis bambustangojn kaj lignobastonojn kiel batalilojn kaj sentime kriis la unuan sloganon: "For la Kin-imperion!"

La kamparana milito La ribelinta trupo gvidata de Ĉen kaj Vu gajnis favoron kaj subtenon de la kamparanoj, kiuj levis ribel-flagojn kaj aliĝis al la armeo, kiu rapide okupis post atako Ki-gubernion, kaj marŝis okcidenten. En nur unu monato, ili jam akiris 6-7 centojn da militĉaroj, pli ol mil kavalerianojn, kelkdek mil infanterianojn. Ili konkeris ankaŭ Ĉen-gubernion (nunan Huajjang, Henan-provinco), kie fondiĝis ilia bazloko. Tiam, eĉe eksplodis multe da kamparanaj ribeloj en diversaj lokoj de la lando.

Unu ribela trupo komandata de Ĝoŭ Ven, baldaŭ transmarŝis la trapasejon Hangu-guan en okcidenta parto de nuna Henan-provinco, kaj atingis lokon nur kelkdek km. for de Hianjang, la ĉefurbo de Kin-imperio. Tiu ĉi ribelula trupo kreskis ĝis kelkcent mil homoj. Tiutempe, pliparto de la Kin-aj armeoj staris ĉe la landlimoj. La Imperiestro Dua konsternite absolvis la krimulojn, kiuj konstruis la maŭzoleon ĉe Li-monto, disdonis al ili armilojn kaj sendis Ĝang Han kiel ilian komandanton por kontraŭbatali la ribelulojn. La armeo de Kin estis tre multe-nombra, kaj Ĝang Han estis generalo tre sperta pri militaj aferoj. La ribelula armeo venkrite retiriĝis, kaj la batal-kampo translokiĝis al la limo de Henan-provinco.

La trupoj kiujn ekspedis Ĉen Ŝeng al diversaj lokoj subtenataj per kunagado de tieaj kamparanoj okupis vastan regionon. La malnovaj aristokratoj de la pereintaj Ses Regno kiu dependigis sin al Ĉen Ŝeng, deziris restarigi la malnovan staton de disigiteco antaŭ Kin-dinastio, kaj instigis generalojn de ĉiuj lokoj, ke ili sin nomu reĝoj kaj ne obeu la ordonojn de Ĉen Ŝeng. Do Ĉen kaj Vu povis nur kontraŭstari solaj la ĉefan forton de Kin-armeo.

Ekestis skismo interne de la armeo de Ĉen kaj Vu. Ĉen Ŝeng estis venkita de Kin-armeo kaj estis mortigita de perfidulo. Ankaŭ Vu Guang estis mortigita de sia subulo.

Kvankam Ĉen kaj Vu mortis, tamen la du ribelaj trupoj komandataj respektive de Hiang Ju kaj Liu Bang daŭre plifortiĝis. En la jaro 207 a. K., Hiang Ju venkis la ĉefan forton de Ĝang Han. La sekvintan jaron, Liu Bang konkeris Hianjang-

on kaj forperei la Kin-dinastio, kies regadon forlavis fine la revolucia tajdo de la kamparanoj.

Batalado inter Hiang Ju kaj Liu Bang Hiang Ju estis eksaristokrato de Ĉu-lando kaj Liu Bang malaltranga oficisto gubernia. Post la renverso de Kin-dinastio, batalado por trono inter Hiang Ju kaj Liu Bang daŭris kvin jarojn. Komence Hiang Ju superis la kontraŭulon per sia potenco. Sed li ĉie bruligis kaj mortigis, kio kaŭzis kontraŭstaron de la popolo. Liu Bang unue abolis la leĝaron de Kin, kaj proklamis al la popolo nur: "Morto al tiu, kiu homon mortigis, puno al tiu kiu vundas aŭ rabas." Li permesis al la popolo kulturi la teron de la imperiestra familio, kaj liberigis la soldatajn familiojn de ĉia imposto, kaj tiel gajnis la subtenon de la popolo, kaj havis riĉan fonton de rekrutoj kaj provizajoj. Li pli kaj pli potenciĝis kaj fine venkis Hiang Ju-n.

En la jaro 202 a. K. Liu Bang fariĝis imperiestro kaj fondis la dinastion Han, kiu historie nomiĝas la Okcidenta Han-dinastio.

Li Ŝi-gjun:

Maja vespero kun

LA 7-an de majo, ni, ĉe 50 Pekinaj geesperantistoj havis aparte ĉarman vesperon kunsidi por bonvenigi malnovan bulgaran esperantiston k-don A. Lakov, kiu venis al Ĉinio kiel membro de Bulgara Eldona Delegacio. La vesperkunsidon ĉeestis ankaŭ nia hungara k-do J. Kiraly kun sia edzino, kaj li tuj komencis viglan interparolon en Esperanto kun la bulgara kamarado.

Post la bonvenigaj vortoj de k-do Ĉen Juan, la ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, k-do A. Lakov komencis sian interesan paroladon pri siaj impresoj pri Ĉinio, pri la socialisma konstruado kaj Esperanto-movado de Bulgario.

Li diris, ke li vizitis, dum sia ĉ. unu-monata restado en Ĉinio, krom la ĉefurbo Pekino, la Granda Muro, ankaŭ la industriajn centrojn Ŝanhajo, Uhan, Nankino kaj la belan turisman urbon Hangĝou

C. C. Chang:

Vietnamio Antaŭenmarŝas

"Vietnamio Antaŭenmarŝas", jen la titolo de nove aperinta trimonata Esperanta revuo eldonata en Vietnamia Demokrata Respubliko. Pri tiu ĉi nova revuo ni jam longe aŭdis kaj ĝin soife atendis. Do la alveno de ĝia unua numero alportis al ni tre grandan ĝojon.

En la unua numero estas multaj interesaj artikoloj, inter kiuj troviĝas "Vietnamaj Beletristiko kaj Arto ekde la Aŭgusta Revolucio", "La Vietnamia Pentrado de la Aŭgusta Revolucio", "Orientiĝo kaj Taskoj de la Trijara Plano", "La Disvolviĝo de Niaj Ensembloj de Kanto kaj Danco kaj la Teatro", "La Vietnamaj Folkloraj Kantoj" kaj specialaj rubrikoj pri Esperanta movado.

De la supre menciita enhavo oni povas konstati, ke la revuo estas ĉefe kultura kaj per ĝi oni povas multe informiĝi pri la kulturo de vietnama popolo, pri kiu, eĉ ni—la plej proksima najbaro de niaj vietnamaj fratoj—tre malmulte scias, jam ne parolante pri eŭropanoj kaj amerikanoj.

La revuo informas nin, ke la vietnama popolo,

kiu heroe batalis por sendependeco kaj libereco, nun energie laboras por prospero kaj feliĉo. Plenuminte la laboron de la ekonomia restarigo, nun ili eniras la periodon de planita disvolviĝo. Tio signifas, ke la vietnama popolo nun luktas por fari sian patrion socialisma lando kun altnivele disvolviĝinta industrio kaj agrikulturo.

Sur la ekonomia fronto, jam multe sukcesis niaj karaj vietnamaj fratoj. Ekzemple la produktkvanto de rizo po hektaro en V. D. R. lastjare estis 2,340 kg., dume, la meza produktkvanto sub la franca regado estis nur 1,200 kg. Tio signifas, ke rizrikolto jam preskaŭ duobliĝis ol antaŭe. La revuo ankaŭ raportas, ke en la kadro de la trijara plano (1958-1960) 7 novaj modernaj entreprenoj estas en konstruado en provinco Phu-Tho. Ili estas: elektra uzino, fabrikejo de ĥemiaj produktoj, uzino de superfosfato, brikfabrikejo, sukerfabrikejo, rizsenŝeligejo kaj paperfabrikejo. La fakto, ke en unu sola provinco estos konstruitaj tiom multe da modernaj entreprenoj, montras al ni la grandskalon de ekonomia konstruado en tiu juna kaj energio-plena respubliko.

Krome, la vietnama popolo ankaŭ pene laboras por pliriĉigi sian kulturan vivon. Tiurilate ni multe interesiĝas, ke ili same kiel ni, ne nur plantas novajn florojn en la kultura kampo, sed ankaŭ revalorigas kaj pliriĉigas la nacian heredaĵon de



gastoj esperantistaj

(fama kiel paradizo sur la tero) apud la ĉarma Okcidenta Lago. Li vizitis fabrikojn, grandajn irigaciajn konstruaĵojn, popolajn komunumojn, infanĝardenon, palacojn, muzeojn, ekspoziciojn kaj teatrojn. Li ankaŭ rigardis la buntan kaj jubilan manifestacion de la Unua de Majo sur la Placo de Tian-anmen. Li rigardis kiel sian feliĉon gastigi ĉe Prezidanto Maŭ Ze-dong kaj aliaj eminentaj ŝtatgvidantoj. Li diris, ke li havas tre profundan impreson pri la rapida industriiĝo kaj la agrikultura pliprodukto de Ĉinio, pri la nova feliĉa vivo kaj la frata sento al socialismaj landoj de la ĉina popolo.

Poste, li parolis mallonge pri Bulgario, la lando de heroa popolo. "Same kiel Ĉinio," diris k-do A. Lakov, "ankaŭ Bulgario estis postiĝinta agrikultura lando antaŭ la revolucio." Tiam ĝi havis nenian pezan industrion. Sed nun, nur 15 jarojn

literaturo kaj arto. La artikolo pri vietnamaj folkloraj kantoj kaj la popolkanto el provinco Bao-Ninh "Tordante fadenon tra kudril'" (kun muziknoto, presita sur la dorsa paĝo de la unua numero) klare montras al ni, ke iliaj atingoj tiuflanke ja estas gratulindaj.

Domage estas, ke Vietnamio estas ankoraŭ dividita en du partoj, la suda kaj la norda. La popolo en la norda parto marŝas ĉiam antaŭen al libero kaj feliĉo, dume tiu en la suda parto droviĝas ĉiam profunden en la abismon de sklaveco kaj sufero. Oni ne povas ne kun granda indigno legi la artikolon "Post Auchwitz, Buchenwald, Dachau . . . Phu Loi", kiu sciigas la legantojn per aŭtentikaj faktoj, ke la tuta parto de Sudvietnamio jam fariĝis unu granda koncentrejo sub la sanga regado de Ngo-dinh-Diem, subtenata de la avidaj Usonaj koloniistoj.

Memkompreneble, la esperantistaro speciale kontentiĝas pri la Esperanta rubriko, kiu informas nin interalie, ke la Vietnama Radio-stacio projektas starigi Esperantan disaŭdigon, ke la ŝtata Fremdlingva Eldonservo aperigos tri Esperantajn librojn kiel kontribuo al la Zamenhofa Jaro, kaj ke Vietnamia Pacdefenda Esperantista Asocio decidis sendi delegitaron al la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

Jen antaŭenmarŝas Vietnamio, jen ankaŭ antaŭen marŝas Esperanto. Jes, Esperanto, la lingvo de paco kaj amikeco, nepre antaŭen marŝas senĉese kune kun la antaŭenmarŝantaj popoloj, kiuj estas liberamaj, amikemaj kaj pacon soifantaj.

post la liberiĝo, Bulgario jam fariĝis lando kun moderna industrio kaj progresita agrikulturo. La socialisma konstruado nun marŝas per ankoraŭ pli grandaj paŝoj, kaj la bulgaraj laboruloj klopodas plenumi la 3-an kvinjaran planon en 2½ aŭ 3 jaroj.

Pliboniĝas la vivo de la bulgara popolo kaj disfloras ĝia kulturo, sekve de kio ankaŭ la Esperanto-movado bone prosperas.

K-do Lakov finis sian paroladon per rakonto pri la historio de la bulgara E-movado, kio interesis la ĉeestantojn plej multe. Ja ĉiuj esperantistoj scias, ke Bulgario estas unu el la plej fortaj citadeloj de nia movado. Sed kial Esperanto tiel bone prosperas en tiu lando? Tiun ĉi demandon k-do Lakov respondis per historiaj faktoj. Esperanto eniris Bulgariion tre frue, jam en la jaro 1888, t. e. nur unu jaron post la apero de la "Unua Libro" de D-ro Esperanto. En la komenco, tie ne estis multaj laboristo-esperantistoj, kaj ekzistis nur neŭtrala E-organizo. Sed bulgaraj laboruloj pli kaj pli interesiĝis pri Esp-o kaj fondis sian E-organizon. La progresema E-movado de Bulgario havas historion ne nur longan sed ankaŭ tre gloran. En la jaro 1923 la progresema bulgaraj esperantistoj jam komencis heroan batalon kontraŭ la faŝisma reĝimo. Malgraŭ likvido de la laborista organizo duonlegala, enkarcerigo de ĝiaj respondeculoj kaj pendigo de ĝia sekretario en la jaro 1923, la revoluciaj esperantistoj daŭrigis sian agadon. En la malfacilaj tagoj, la esperantistoj klopodis akiri revoluciajn literaturojn kaj utilajn materialojn per Esp-a korespondado kun Sovetiaj kaj alilandaj esperantistoj, kaj tiel helpis la subteran agadon de la kompartio sub la gvidado de k-do Dimitrov. La bulgaraj esperantistoj faris bonan servon al la popolo, kaj multaj el la bulgaraj eminentaj revoluciistoj komprenas la valoron de la internacia lingvo, tial E-movado bonege prosperas post la liberiĝo de la lando. Dum la periodo 1953-1957, la bulgara E-movado iom stagnis pro tio, ke ankaŭ la bulgaraj esperantistoj estis tre okupataj per urĝaj laboroj de la 2-a Kvinjara Plano. Ekde 1957 E-movado denove vigliĝas kaj rapide kreskas la membraro de la Bulgara Esperanto-Asocio. En 1958, B. E. A. havis 2,800 membrojn kaj 100 lokajn societojn tra la lando. En la kuranta jaro, ĝi klopodas efektiviĝi sian planon pligrandigi la nombron de sia membraro ĝis 4,500 kaj plimultiĝi la lokajn societojn ĝis 150.

La instrua parolo de k-do A. Lakov tiel interesis la aŭskultantojn, ke ili faris al li, post lia parolado, ankoraŭ demandon post demando, kaj ĉi tiujn demandojn k-do Lakov afable respondis unu post alia. Jam estis tre malfrue, kaj ne decidis tro lacigi nian amikon kaj gaston, do ni ankoraŭ foje dankis lin per pluvo de manklakadoj kaj diris: Ĝis revido!

Esperanto Marŝas

Eldonaĵoj de ĈEL por honoro al Zamenhof-jaro

Estas planita la eldono de **Ĉina Antologio**, 1949—1959. Ĝi eliros ĉirkaŭ la naskiĝtago de D-ro L. L. Zamenhof, ĉijare. La tuta entreprenado estas sub zorgo de ĈEL. Estas nun plenvaporo farata la reviziado de la manuskriptoj por konkurenci kun la tempo.

Multaj samidanoj kunlaboras, rekte aŭ malrekte. La poezia parto estas trdukata ekskluzive de s-ano S. J. Zee. La libro havos pli ol 400 paĝojn en la kutima formato de la antologioj. Pluraj ilustraĵoj ĝin ornamas.

La novelkolekto **“Por nova afero, nova maniero”** jam aperis en julio. Kaj pli frue la bildrakonto **“Mi volis viziti lernejon”**. Sekvos en venontaj monatoj **“Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Respubliko”** kaj la preparataj du serioj de bildkartoj, broŝuritaĵoj en kajero, titolitaĵoj **“Homo”** kaj **“Floroj kaj birdoj”**, ĉiu el po 8 pentraĵoj faritaj laŭ ĉina tradicia maniero, multkoloraj presotaĵoj.

Esperanto-rondo en Ĉunkino

En la 25-a gimnazio en Ĉunkino, granda urbo en Siĉuan-provinco, organiziĝis Esperanta studrondo kaj lernogrupo sub gvido de k-do Li Ren, lerneja estro de tiu gimnazio. La studrondo konsistas el 4 instruistoj de la lernejo. Ili kunvenas unu fojon en ĉiu semajno por solvi problemon en la memlernado. La Esperanta lernogrupo estas organizita kiel libervola agado ekster lernejaj taskoj. Ĝin partoprenas ĉirkaŭ 50 lernantoj kaj ĝin gvidas k-do Leng Ŝu-guj, ankaŭ instruisto de la lernejo.

Bulgara literaturo konigita en Ĉinio per Esperanto

Pro malfacilo de lingvaj baroj la literaturo de Bulgario, kiel de aliaj multaj landoj, estas konigitaj en Ĉinio pere de aliaj lingvoj. Inter ili Esperanto ludas sufiĉe rimarkindan rolon. El ĝi tradukiĝis jam pli frue “Bulgaraj Rakontoj”, “Avo Joco rigardas” kaj “Novaj bulgaraj rakontoj” de Ivan Vazov kaj aliaj aŭtoroj. “Baj Ganju” de Aleko Konstantinov, “Septembro kaj aliaj poemoj” de Geo Milev kaj aliaj, “Elektitaj rakontoj” de Elin Pelin, “Vilao apud la maro” kaj “En la tombejo” de G. P. Stamatov. Krome estis multaj noveloj tradukitaj el “Bulgara Antologio” kaj “Internacia Kulturo”, la iam grandformata Esp-a gazeto eldonita en Bulgario. Nun pliaj du literaturaj verkoj estas tradukitaj en ĉinan lingvon el Esperanto, nome: “Tra la ventego” poemaro de H. Smirnenski kun liaj kelkaj prozaj verkoj. Ĝin tradukis k-do Sun Jong, kiu ricevis lastjare hungaran ordenon pro sia merito en la tradukado de hungaraj literaturaĵoj en ĉinan lingvon. La alia estas “Vagabondoj”, novelo de Ivan Vazov. Ĝi estas tradukita de k-do Honfan laŭ Esperanta traduko de I. Kovaĉev. Tiuj ĉi du libroj eldonos la ŝtata Popola Literatura Eldonejo. Kaj nun la tradukoj estas jam en la presejo.

Vietnama Kontribuo al la Zamenhof-jaro

Por la Zamenhof-jaro Vietnamo Pacdefenda Esperantista Asocio multe laboras. Ĝi varbis s-ron Hoang Minh Giam, ministro de kulturo de Vietnamo, por la Internacia Patrona

Komitato kaj helpas la ŝtatan Fremdlingvan Eldonservon eldoni tri Esperantajn librojn, nome: **Amika Vietnamo**, verko de aŭstralia verkisto, pri Vietnamo en ĉiuj ĝiaj aspektoj historia, kultura, socia kun ĝia heroa kaj pacama popolo; **La unuaj tagoj de nia batalo**, elektitaj noveloj de nuntempa Vietnamo; kaj **La vivo de Ho-Chi-Minh**, rakontaro pri la gvidanto de vietnama revolucio. Ĉiuj estas mendeblaj ĉe SO XUAT NAHP KHAU SACH BAO, 32 Hai Ba Trung, Hanoi (Vietnam). Prezo de la 1-a libro: 3 rubloj aŭ 0.75 US \$.

Esperanta disaŭdigo planata en Vietnamo

Laŭ rezolucio de la Estraro de Radio Stacio “Voĉo de Vietnamo” la stacio komencos je la fino de kuranta jaro Esperantajn disaŭdigojn. En ĝi troviĝos ne nur informoj, sed ankaŭ Esperantaj kantoj kaj muzikaj programoj. Sendu amase leterojn al ĝi por akceli la efektiviĝon.

Al Brno-Foiro servas Esperanto

Ekde la 6-a ĝis la 20-a de septembro en kuranta jaro okazos internacia foiro en Brno, la fama urbo en Ĉeĥoslovakio, kie oni prezentos ĉefe produktojn de maŝinaj kaj metalurgiaj industrioj, ankaŭ krudmaterialojn kaj duonfabrikaĵojn de la koncernataj industriaj branĉoj kaj kelkajn produktojn de la maŝin-fabrika industrio konsum-karakterata. Por propagando kaj informo la foiro interalie alprenas ankaŭ Esperanton kiel seriozan kaj gravan helpilon por amika, paca kaj komerca servo kaj laboro. Tiun laboron helpas Esperantista Klubo en Brno. Eldoniĝis por tio jam speciala eldono de “Informa Foira Bulteno de Brno”. Oni povas ĝin peti de la Presfako de Specimena Foiro de Brno, filio Praha 3, Václavaké nam, 57.

Estas petataj ĉiuj esperantistoj laŭeble utiligi la materialojn por plivaste konigi la foiron. Servojn de esperantista tradukisto por vizitantoj en la foiro oni povas peti ĉe la foira oficejo.

Fotografajoj pri Zamenhof

S-ro Henk Thien (adr.: Uiterwaardenstraat 12/2 . . . Amsterdam, Nederlando) planis kolekti ĉiujn fotografajojn de kaj pri Zamenhof por reprodukti ilin en bildobiografio de nia majstro kiel memorajo por la centjara jubileo de Zamenhof. Jen projekto necesa kaj aprobinda. Ĉiuj esperantistoj, kiuj konservas tiajn fotografajojn, estas petataj subteni la iniciaton kaj pruntedoni siajn konservajojn al

la kolektanto. Pretaj kliŝoj de tiaj fotoj ankaŭ estas petataj.

“Esperanata Marŝo” mendebla

Muzik-eldonejo Panton (adr.: Besedni 3, Praha—1, Malá Strana) en Ĉeĥoslovakio decidis eldoni Esperantan marŝon, kiu nomiĝas “Vivu Esperanto!” en la arango por fortepiano kun gitar-signoj kaj Esperanta teksto. La marŝo estas plaĉa komponaĵo, kiun oni povas kanti en la kluboj kaj krome ĝi estas facile adaptebla por normalaj danc-orkestroj.

Sed tiun marŝon eldonos la eldonejo nur tiam, kiam la menditaj ekzempleroj atingos almenaŭ 1,500. Interesatoj sendu tuj viajn mendojn ĉu amasajn

ĉu individuajn al supre menciita adr.! Prezo por unu ekzemplero de tiu marŝo estas 4 Kĉs. proksimume 7 rkp.

“Esp-novajo” en Svedlando

Ekde marto ĉijare Sveda Esperanto-Federacio eldonas novan bultenon trimonatan “Esperanto Nytt” (Esperanto-novajo) flanke de la konata “La Espero”. La nova bulteno celas informi la svedan publikon pri Esperanto kaj progreso de ĝia movado kaj estas senkoste dissendata al eminentuloj en ĉiuj kampoj en la lando. Do ĝi estas informa bulteno por neesperantistoj, tial ĝi esta redaktata en nacia lingvo. Jen nova iniciato por Esperanto-propagando.



Sur Nia Librobreto

Senzi Yamaguti: **La Belan Pacon** —Broŝureto 31-paĝa kun formato 13 × 18 cm. akuzanta la krimon de atombombardo. La verkinto mem estas viktimo de la bombo. Ĝi estas tradukita de Ter, Isiguro kaj eld. de “Ĵaŭda Rondo” en Tokio, havebla ĉe Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati, Tokio, Japanio. Prez. \$0.20 aŭ 2 rpk.

Tiu ĉi broŝureto donas nenian eksterordinaran impreson al la legantoj je la unua vido. Sed nur se oni tralegas la unuajn paĝojn, oni tuj estas kaptita de indigno de la potenca homa voĉo suferanta de la “homa” krimo. Kiel esperantistoj, ĉiam pac-sopirantaj, eble vi jam vin vicigis sur la fronto de pacbatalo kaj multfoje esprimis vian

opinion kontraŭ la nukleaj armiloj. Tamen kredeble vi havas ankoraŭ palan bildon pri la krimo de atombombardo, se vi mem ne tion spertis. Jen mi rekomendas al vi aŭskulti la plendon de s-ro S. Yamaguti kaj sperti pere de lia plendo la teruran scenon kaj la fatalan sekvon. Viaj haroj certe hirtigis kaj estiĝos sento de naŭzo kaj terura frostiĝo tra la tuta korpo dum la legado. Ĝi ne estas ia literatura legaĵo por distriĝo, nek ia frivola rakonto, sed solena kaj korpenetrema alvoko je la nomo de homo celanta “la belan pacon”. Ĝi meritas la atenton kaj diskonigon de ĉiuj esperantistoj pac-sopirantaj.

Honfan

Taglibro de Anne Frank: Vivrekordo de 13-jara juda knabino sub hitlera regado, tradukita de G. J. Degenkamp el nederlanda originalo, 219 paĝoj, tole bindita kun formato 13.5 × 19.5 cm, prez. guld. 7.80 aŭ \$2.15 mendebla ĉe la eldonejo “Heroldo de Esperanto”, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

Eklegante la libron, mi estis tuj plene allogita. Anne Frank per sia propra sperto skribis klare kiel la judoj persekutataj vivis senespere en la malluma situacio dum la regado de Hitlera Faŝismo. En la taglibro mi legas, ke Anne Frank havis sian propran idealon pri vivo. Ŝi estis ankaŭ tre lernema, ke eĉ dum la malluma vivo ŝi ankoraŭ lernis diligente kaj provis verki senlace. Ŝi ja sopiris al libera kaj feliĉa vivo. Sed la faŝistoj forprenis ne nur ŝian liberecon kaj feliĉon, sed eĉ ŝian vivon. La libro, registranta la dolorplenan vivon de juda familio, estas per si mem bona atestanto de la barbara konduto de faŝisma reĝimo. La taglibro

mem plene montras, ke Anne Frank estis knabino kun supera talento por literaturo. Estas tre domaĝe ke ŝia talento estis estingita de la faŝistaro je ĝia ekbrilo. Sed aliflanke, oni ankaŭ povas diri, ke la faŝistoj ne sukcesis sufoki ŝian animon. En ŝia taglibro Anne Frank diris: "Mi volas plu vivi ankaŭ post mia morto." Jes, kvankam ŝi estis mortigita, ŝi ja ankoraŭ vivas en nia koro.

Mi devas esprimi mian koran dankon al S-ro G. J. Degenkamp, kiu donas al mi la ŝancon legi tiun ĉi eminentan verkon pro tio, ke li tradukis ĝin kun tiel bona, simpla, klara kaj eleganta stilo, ke malsperta esperantisto kiel mi ankaŭ povas facile ĝin kompreni.

Ilin

KOKO-SERIO

Poul Thorsen: **Rozoj kaj Urtikoj** — poemaro parte originale verkita kaj parte tradukita el dana poezio, 127 paĝoj kun 29 ilustraĵoj, prez. 10.50 d. kr.

K. Kalocsay: **Ezopa Saĝo** — 77 fabloj de Ezopo verse reverkitaj de la Esp-a poeto. Krome estas longa poemo pri Ezopo, 28 ilustraĵoj, prezo 9 d. kr.

Johan Hammond Rosbach: **Homoj kaj Riveroj** — 20 rakontoj pli-malpli veraj, originale verkita. 136 paĝoj prez. 12 d. kr. Ferenc Szilagy: **Mistero Minora** — Originala romano pri ama epizodo, 119 paĝoj en 4 partoj, prez. 12 d. kr.

Antaŭ nelonge mi tralegis la suprecititajn 4 librojn el la KOKO-serio, kun formato 13 × 21 cm., helgriza bindaĵo kaj vinjeto de Borge Hamberg, eldonitaj sinsekve en la jaroj 1954, 1956, 1957, 1958, ĉiuj mendeblaj ĉe la eldonejo KOKO, Randbolvej 4, Kopenhago F. Danlando. Per ĉi tiuj eldonaĵoj KOKO multe kontribuas al Esperanta literaturo. La verkoj

estas facilstilaj kaj foj-foje oni trovas freŝajn sentojn dum la legado. Tamen mi ankaŭ konstatas, ke la poeziaj libroj estas multe pli valoraj ol la prozaj, kvankam al poezio mi estas tute laika.

Ezopa Saĝo certe estas majstra verko. Tie oni trovas la trezoron de la homa saĝo postlasitan de la greka sklavo en perla vesto. Tiel ĝi brilas ambaŭ en have kaj forme. Kiel La Fontaine diris pri la arto de fablado, "Ezopa Saĝo ja ne nur instruas, sed ankaŭ plaĉe ĉarmas." Krome, Kalocsay ne nur ankoraŭfoje majstre riĉigas la Esperantan poezion per la koncizaj fabloj de Ezopo, sed ankaŭ revivigas la malfeliĉan malbelan sed saĝan kaj amindan sklavon en la enkonduka poemo "Ezopo". Post la legado de la libro, Ezopo kaj liaj fabloj vivas por ĉiam en la koro de la legantoj.

Ankaŭ Poul Thorsen en sia poemaro bone konigas al la legantoj la interesan parton de dana poezio kaj per liaj propraj verkoj kontribuas al la Espe-

ranta. Verŝajne la unua parto estas pli alloga. Tamen troviĝas en ĝi ankaŭ verko donanta nur distorditan respegulon. Ekzemple sub la titolo "Leprulo" la aŭtoro priskribis sian impreson en Ŝanhajo, tiam sklavigita de ĉiuj imperialistoj. Evidente la priskribo ne tuŝis esencan punkton nek veran kaŭzon, sed nur la negativan flankon de la subpremita sed heroa urbo kaj trompan aserton de la imperiestroj, ke dio donis al ĝi tiun sorton.

En **Homoj kaj Riveroj** oni ofte trovas pecojn bonajn kaj interesajn. Sed ĝenerale mi ne ŝatas la koloron ĉiam grizan kaj senesperan. Eble tio respegulus vivmedion de la aŭtoro. **Mistero Minora** ŝajnas al mi verko sensignifa. La rakonto seninteresa kaj la priskribo enuige longa, kvankam la aŭtoro estas fame konata kaj oni povas ĝui el ĝi multajn freŝajn esperantajn esprimojn, sed por la tuta verko mi povas diri nur malŝaton.

Honfan

KORESPONDI DEZIRAS

* **Gestudentoj kaj gelernantoj**, 16-20-jaraj, dez. kor. kaj interŝ. Skribu Esperante aŭ ruse, angle, france, germane al peranto: USSR Jaroslavi, P. O. Poŝtkesto No. 31. **A. A. Semenov.**

* **P. Balkányi**, Hungario, Budapeŝt, 11, Pesnidegkút, Haraszt u. 33 dez. interŝanĝi infandeseĝnaĵojn, pacafiŝojn, revuojn kaj fotojn kaj kontakti kun lernejoj, junula domo kaj geamikoj.

Adreso de s-ro **Oskar Berman**, fakdelegito de ĵurnalismo en Izraelo, ŝanĝiĝis. Ĉio por li de nun adresu al: Kikar Malchey Israel 6/4, TEL-AVIV (Izraelo).

* **3 bulgaraj junuloj** dez. kor. kun ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj kaj interŝ. pk.: Milen As Fiĉev. Plovdiv, st. Peruŝtica klon I N. 2; Konstadin Mitrev, s. Hr. Milev. Asenovgradsko; Todov Rajkovski, S. Borima, reg. Trojan. Ĉiuj en Bulgario.

* **Jordan D. Kalinov**, str. Georgi Dimitrov, 122, Ruse, Bulgario, oficisto, dez. kor. ĉiuteme, tutmonde kaj interŝ. presajojn. Li proponas al siaj ĝisnunaj kaj estontaj korespondantoj fari unuan renkonton en 44-a U.K. en Varsovio.

* **D-rino Eröss Guláné** Budapest II. Nagybányai ut 57. Hungary, dez. kor. kun la tuta mondo.




1. Ankaŭ traktoroj venis al la Tibeta altebenajo.



2. Batalantoj el la Popola Liberiga Armeo (PLA) helpas al tibetanoj en rikoltado de rafanoj.

3. PLA-anoj instruas al tibetaninoj kiel uzi kudromaŝinojn.



4. Helpe de la Centra Registaro fondiĝis en Lhasa hospitalo, kie ankaŭ bakigas tibetaj kuracistoj por servi al la popolo.



5. Fondiĝis modernaj lernejoj en Lhasa por la Tibetaj geknaboj.

(Fotoj de Hinhua-NAVajservo)

桂 薩 街 景

一九五八年夏

